


# EL POPOLA ĈINIO

中國報章

8 1984




# Perloj ĉe la Flava Rivero

Fotoj de HAN SANDANG

La Flava Rivero preterfluas la  
sudan randon de Tenger-dezerto.

Foto de ŬANG FUZUN




Konstruanto de elektrejo  
ĉe la Flava Rivero

Foto de JAN ĜIN

Sablo-sedimenta baseno








Elektro fluas al  
urboj kaj vilaĝoj.  
Foto de JAN ĜIN






Longjangŝja-hidroelektrejo en konstruado


Parto de alttensia ŝaltejo  
de Liŭĝjaŝja-hidroelektrejo

Foto de JAN ĜIN







Sanmenšja-hidroelektrejo  
Foto de ŬANG DEJING




Jangŭoŝja-hidroelektrejo





Bapanšja-hidroelektrajo



Čingtongšja-hidroelektrajo



Monata gazeto eldonata de  
ĈINA ESPERANTO-LIGO  
P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto:

Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio  
(GUOJI SHUDIAN)

Esperanta Sekcio

P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

## SUR LA KOVRILO:

S-ro Y. Umeda, vicprezidanto de UEA, kaj s-ro S. Milojeviĉ, ĝia ĝenerala direktoro, en Pekino (Bv. legi la artikolon "Reprezentantoj de UEA en Pekino" en tiu ĉi numero.)

Foto de LAŬ BAJ

## SUR LA DORSKOVRILO:

Unu el la ora gamo-sonorilaro (Bv. legi la artikolon "Retrovita la ora gamo-sonorilaro" en tiu ĉi numero.)

## KOLORAJ SERIOJ:

Perloj ĉe la Flava Rivero  
Tjantong-templo  
Fotaj faritaj de esp-istoj  
La riĉa Jinĉŭan-ebenaĵo  
Tradiciaj metioj en Ĝanang-gubernio


## NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:

Reprezentantoj de UEA en Pekino  
Sep-landa Esp-ista vizitgrupo en Ĉinio  
Rumanaj artistoj en Ĉinio

## Enhavo

Sesio plena de reforma spirito . . . . .	2
Hidroelektra konstruado sur la supra parto de la Flava Rivero . . . . .	3
Televidila industrio de Pekino . . . . .	5
Provizado de akvoproduktaĵoj en Kantono . . . . .	7
Ekzemplo de kuraĝulo . . . . .	9
KURANTAJ AFEROJ . . . . .	11
Sude kaj Norde de la Granda Muro (8): Ĉe Jinĉŭan-ebenaĵo . . . . .	50
Denove Esperantista vizitgrupo en Ĉinio . . . . .	33
SUR NIA LIBROBRETO . . . . .	12
POR KOMENCANTOJ: Lernemulo . . . . .	15
ESP-NOVAĴOJ . . . . .	16
POR VIA SANO: Belfiguriga gimnastiko . . . . .	19
Sincera kunlaboro . . . . .	20
Retrovita la ora gamo-sonorilaro . . . . .	23
Gasti en hejmloko de grandaj pandoj . . . . .	27
MIA VIVO: Ĉiam strebi antaŭen . . . . .	31
Kapriĉe pri la ĉeĥoslovaka muzika jaro . . . . .	36
Tajĝiĉŭan trans landlimon . . . . .	39
VIDINDAJ LOKOJ: Revizito al Tjantong . . . . .	25
5 000 JAROJ DE ĈINIO: La kulturo de la dinastioj Song kaj Jŭan . . . . .	42
ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Kun kiuj landoj Ĉinio starigis diplomatiajn rilatojn . . . . .	45
ĈINLINGVA KURSO: Oka leciono . . . . .	47
KORESPONDI DEZIRAS . . . . .	35

JARABONTARIFO		FR Germanio	DM	14.00	Italio	Lit	6000.00	Portugalio	Esc.	500.00	
Aŭstralio	\$A	Britio	£	4.00	Japanio	Yen	1400.00	Svisio	SF	12.00	
Aŭstrio	Sch	Finnlando	FMK	30.00	Jugoslavio	Din.	200.00	Usono	US\$	6.00	
Belgio	BF	Francio	FF	40.00	Nederlando	Gld.	16.00	Kanado	Can\$	7.50	
		Hispanio	Pts	700.00	Nov-Zelando	NZ\$	8.00				
Por aliaj landoj en Eŭropo:		£	4.00	US\$	6.00	Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:		£	2.80	US\$	4.00



*La reprezentantoj aprobas rezolucion.*

# Sesio plena de reforma spirito

**L**A Dua sesio de la Sesa Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko okazis en Pekino inter la 15-a kaj la 31-a de majo 1984. Ĝi estis grava kunveno plena de demokratia kaj reforma spirito.

Dum tiuj tagoj pli ol 2 700 reprezentantoj varme diskutis pri la raporto de ĉefministro Ĝaŭ Zijang pri la registara laboro kaj aliaj raportoj. La sesio ekzamenis kaj aprobis “la Leĝon de la Aŭtonomio de Naciminoritatoj de la Ĉina Popola Respubliko” kaj “la Militservan Leĝon de la Ĉina Popola Respubliko”.

La sesio estis kontenta pri la laboro de la

Ŝtata Konsilantaro kaj alte taksis la gvidan penson denove emfazitan de ĉefministro Ĝaŭ Zijang en lia raporto: Daŭre sekvi la principon atingi socialismajn materian kaj spiritan civilizaciojn, bone fari ĉiujn laborojn kaj antaŭenigi la ekonomian konstruadon. La reprezentantoj montris, ke prosperigi la ekonomion estas postulo de nia epoko. La ekonomia konstruado estas kerno de nia socialisma modernigo kaj neniam devas esti neglektata.

La sesio opiniis, ke ĉefe fari reformon de sistemo kaj praktiki malferman politikon al la fremdaj landoj en nia estonta ekonomia laboro



# HIDROELEKTRA KONSTRUADO SUR LA SUPRA PARTO DE LA FLAVA RIVERO

**L**A Flava Rivero kun longeco de 5 464 kilometroj estas la dua granda rivero de Ĉinio. Ĝi ricevis la nomon pro sia flava akvo, entenanta grandan kvanton da ŝlimo.

Ĝi fontas el la norda piedo de Bajankara-montaro, Ĉinghaj-provinco en la nordokcidenta Ĉinio, trafluas vastajn regionojn de la norda Ĉinio, kaj fine enfluas en la maron Bohaj. Ĝi havas abundan akvoenergion kun meznombrata jara flukvanto de ĉ. 50 miliardoj da kubmetroj kaj niveldiferenco de pli ol 4 800 metroj. En la historio la baseno de la Flava Rivero estis lulilo de la antikva civilizacio de la ĉina nacio.

Sed en la historio, la rivero plurfoje ŝanĝis sian fluejon kaj

breĉiĝis, alportis profundan malfeliĉon al la ambaŭbordaj loĝantoj. Reordigi kaj ekspluati ĝin ja estas forta deziro de la ĉina popolo dum la pasinta longa periodo. Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko en 1949, la Centra Popola Registaro komencis ellabori planon por radikale subjungi la riveron, irigacii kiel eble plej multe da kampoj kaj konstrui hidroelektrajn.

Laŭ la ŝtata plano oni starigos 46 pivotajn akvomastumajn konstruaĵojn sur la rivero, kies ekspluata akvoenergio atingis 26.5 milionojn da kilovattoj, el ili 12.6 milionoj troviĝas sur ĝia supra parto.

La Flava Rivero torentas malsupren de la Ĉinghaj-Tibeta Alte-

benajo. Ĝia supra parto de la riverfonto ĝis Tŭoketŭo de la Interna Mongolio longas 3 472 kilometrojn. Tiu parto havas abundan akvon, grandan niveldiferencon kaj malmulte da sabloŝlimoj, precipe ĉe la pli-ol-900-kilometra riverparto inter la ravinoj Longjangŝja kaj Ĉingtongŝja sin trovas pli ol 20 ravinoj malsame longaj. En la plej mallarĝa ravino oni povas vidi de malsupre nur strion da ĉielo kaj la akvo fluas muĝante kaj tre rapide. Tie estas multaj idealaj lokoj por konstrui akvorezervejojn kaj hidroelektrajn, pro kio oni rigardas la parton kiel konvena loko por konstrui hidroelektrajn.

En la pasintaj pli ol 20 jaroj


---

estas saĝa decido konvena al la cirkonstancaro de Ĉinio. Ambaŭ aferoj havas gravan signifon por garantii la stabilan kreskadon de la nacia ekonomio en la proksima estonteco, meti firman bazon por la ekonomia prosperiĝo en la naŭdekaj jaroj kaj akceli plenan leviĝon de la socialisma konstruado.

La kunvenantoj montris, ke ekzistas multaj favoraj kondiĉoj por la reformo, tio estas, la ĝustgvido de la Centra Komitato de la Partio kaj la Ŝtata Konsilantaro, la bona sperto de la kamparo en la lastaj jaroj, la granda nombro da oficistoj sin dediĉantaj al reformo kaj la entuziasmo de la

vasta popolo. Sed la reformo estas profunda revolucio kaj ankoraŭ troviĝas du baroj, kiujn oni devas forigi. Unu estas influo de maldekstrema penso kaj la alia, kateno de rutinoj kaj tradicia ideologio. Tial oni devas fari edukon, levi komprenon de la kadroj, senbarigi la vojon de reformo, plue liberigi la penson kaj plivastigi la vidkampon por iri per grandaj paŝoj.

La voĉoj por reformo ĉe la sesio montris la deziron de la ĉina popolo. Kaj la reformo jam fariĝis ĉefa tendenco en la nuna Ĉinio. Ĝi donos grandan vivenergion al nia socialisma afero kaj antaŭenpuŝos ĉiujn niajn laborojn.



*Longjangŝja - hidroelektrajo en konstruado*

la ŝtato investis pli ol 1 250 milionojn da ĵuanoj (egale al ĉ. 625 milionoj da usonaj dolaroj) por konstrui en la supra parto kvin hidroelektrajn Liŭĝjaŝja, Jangŭoŝja, Bapanŝja, Ĉingtongŝja kaj Sanŝenggong kun totala kapacito de 2 069 000 kilovattoj. Nun ili ĉiujare produktas 9.94 miliardojn da kilovattoroj.

Septembre, 1958, la ekkonstruo de Jangŭoŝja-hidroelektrajo markis inaŭguron de la hidroelektra konstruado sur la supra parto de la rivero. Tri jarojn poste la unua generatora kompleto ekfunkciis. Ekde tiam la antikva rivero komencis kontribui lumon kaj varmon. Post ĝi aperis Ĉingtongŝja-hidroelektrajo kun akvomastromaj konstruaĵoj en la Ningŝja-a Huj-nacieca Aŭtonoma Regiono. Ĝia ĉefa tasko estas irigacii kampon, produkti elektron, bridi inundon kaj inundon kaŭzitan de flosanta glacio. En la komenco de la

60-aj jaroj Sanŝenggong-hidroelektrajo kun irigaciaj konstruaĵoj finkonstruiĝis en la Interna Mongolio. La 2 000-metra baraĵo interrompis la akvofluon de la rivero kaj altigis la akvonivelon, 18 elektraj akvoreguligaj kluzoj povas elkonduki pli ol 500 kubmetrojn da riverakvo ĉiusekunde, la akvo povas irigacii tra 400-kilometra kanalo grandan nombron da kampoj. Pro tio la loko fariĝis unu el la gravaj komercgrenaj bazoj de nia lando.

En 1964 la konstruo de Liŭĝjaŝja-hidroelektrajo, la plej granda konstruo sur la supra parto de la rivero komenciĝis kaj finiĝis post dek jaroj. La hidroelektrajo kun generatora kapacito de 1 220 000 kilovattoj ĉiujare povas produkti 5.7 miliardojn da kilovattoroj, kiuj superis la unujare produktitan elektron de la tuta lando en la malnova Ĉinio. La baraĵo 147 metrojn alta interrompis la torentan riveron,

kio formis grandiozan pejzaĝon. La baraĵo Liŭĝja-akvorezervejo povas enteni 5.7 miliardojn da akvo. En pluva sezono ĝi rezervas superakvon kaj en la seka sezono ellasas akvon por altigi la elektran produktokvanton de la hidroelektrajoj Jangŭoŝja, Bapanŝja kaj Ĉingtongŝja, kaj samtempe provizas sufiĉan akvon al milionoj da hektaroj da kampoj en Gansu, Ningŝja kaj la Interna Mongolio.

La rivero trafluas Gansu-provincon, kie ĝiaj bordoj estas kru-taj rokmuroj kaj la kampoj pli altaj ol la riverlito je kelkdekaj ĝis 600 metroj, tial la loko estis seka montregiono fame konata en la historio. En la tempo de trosekeco la akvo fluis en la rivero dume oni ĉagreniĝis ĉe borde. La konstruitaj hidroelektrajoj sur la supra parto de la Flava Rivero kreis favorajn kondiĉojn por elektra irigacio. Nun tie oni jam konstruis pli ol 3 000 grandajn, mezgrandajn kaj malgrandajn pumpstaciojn, dank' al kiuj la rivero povas irigacii la kampojn longtempe akvomankajn. Inter la menciitaj stacioj la plej granda estas la 12-ŝtupa Ĝingtaj-ĉuan-pumpstacio kun akvoleva povo de 446 metroj, je 130 kilometroj norde de la urbo Lanĝoŭ. La loko sin trovas ĉe la rando de Tenggeli-dezerto. Dank' al la pumpstacio, la lokanoj plantis 2 000-kilometran forstozonon. Tio faris la pasintan sekan dezerton en oazon.

La sinsekve konstruitaj hidroelektrajoj ludis sian sintezan rolon en reguligo de la flukvanto de la rivero, en kontraŭinundo, produkto de elektro kaj irigaciodo. Nun forta kurento proviziĝis al la provincoj Gansu kaj Ĉinghaj, kio multe akcelas la disvolviĝon de la industria kaj



# Televidila industrio de Pekino

**A**NTAŬ kvin jaroj oni povis aĉeti 9-colan nigran-blankan televidilon en Pekino nur per kupono, sed hodiaŭ tia televidilo jam elmodiĝis. 12-cola nigra-blanka televidilo jam populariĝis kaj pli kaj pli da homoj, inkluzive de antaŭurbaj kamparanoj, konkure aĉetas kolorajn televidilojn 14-20-colajn por anstataŭigi

siajn nigrajn-blankajn televidilojn. En la unua duono de la kuranta jaro ofte okazis, ke antaŭ ĉiu granda magazeno en Pekino aperis longa vico da atendantoj, kiuj deziris aĉeti kolorajn televidilojn produktitajn de sia urbo.

Tiu ŝanĝiĝo montris la unuan

progreson de la televidila industrio de Pekino. Laŭ statistiko, la televidila industrio de Pekino liveris al la enlanda merkato malpli ol 40 000 9-colajn nigrajn-blankajn televidilojn en 1978, sed 480 000 nigrajn-blankajn kaj kolorajn televidilojn minimume 12-colajn en 1982. Laŭ plano oni liveros 555 000 kurantjare.

urba konstruado en la nordokcidenta Ĉinio.

Ŝjining, la ĉefurbo de Ĉinghaj-provinco, kun historio de pli ol 2000 jaroj, spertis sociajn ŝanĝojn en la pasintaj jaroj, antaŭvespere de la Liberiĝo la urbo jam fariĝis kaduka kaj okupis areon de nur 2 kvadrataj kilometroj, kaj la akvo uzita de loĝantoj estis alportata de azenoj el la rivero. Nun la industria kaj agrikultura produkto kaj la loĝantoj de la urbo povas facile akiri sufiĉe da akvo. La urbo pligrandiĝis 25-oble ol antaŭe, la loĝantaro pliiĝis de 50 000 al 400 000, kaj rapide kreskas la industrioj maŝina, lantekstila, ŝtala kaj aliaj.

Langou, la ĉefurbo de Gansu-provinco, trairita de la Flava Rivero estis sur la fama "Silka Vojo" en la historio kaj estas ankaŭ la loko trapasenda al Ĉinghaj kaj Ŝingjang. Antaŭe tie ne estis fervojo, kaj mankis energio, sed estis nur kelkaj postiĝintaj lanspinaj kaj sapofaraj metiejoj. Samtempe kun la ekspluato kaj

utiligo de la akvaj riĉfontoj sur la supra baseno de la rivero, la urbo jam havas facilan trafikon kaj transporton kaj sufiĉan elektron. Nun multe ŝanĝiĝis la urba fizionomio. Tie fondiĝis la unua granda olerafinejo de nia lando — Langou-a Olerafinejo kaj la Langou-a Kemiindustria Kompanio, unu el la plej grandaj petrolaj kaj kemiaj kombinaĵoj. Langou jam fariĝis grava industria urbo kun miliono da loĝantoj kaj havas industriojn petrolan, kemian, maŝinan, rafinan kaj ŝpinteksan.

En la lastaj jaroj la hidroelektra konstruado sur la supra parto de la Flava Rivero havis pli grandan disvolviĝon. Longjangŝja-hidroelektrujo komencis konstrui en 1978. Nun la riverbaraĵo estas en konstruado. Laŭ la projekto la hidroelektrujo havos baraĵon altan je 178 metroj, akvorezervejon kun kapacito de 24 700 milionoj da kubmetroj, generatoran kapaciton de 1 280 000 kilovattoj kaj ĉiujare

povos produkti 6 miliardojn da kilovattoj. Finkonstruite, ĝi ne nur liveros fortan kurenton al Ŝjining kaj Langou kaj iuj agrikulturaj kaj paŝtaj regionoj de la provincoj Gansu kaj Ĉinghaj, sed ankaŭ sin kunligos kun la elektra reto de la provincoj Ŝenŝji kaj Gansu, kaj fariĝos plej grava hidroelektrujo en la nordokcidenta Ĉinio. Tiu granda akvorezervejo multe altigos la elektroproduktan povon de la hidroelektrujoj Liŭĝjaŝja. Jangŝja, Bapanŝja kaj Ĉingtongŝja, kaj ludos gravan rolon en brido de inundo kaj inundo kaŭzita de flosanta glacio kaj akva provizo al industrio kaj agrikulturo de la mezaj kaj mal-supraj basenoj de la rivero. Krome, aliaj hidroelektrujoj sur la supra parto de la Flava Rivero estas en streĉa esplorado kaj projektado. Post nelonge aperos unueca granda elektra reto en la nordokcidenta Ĉinio, kaj la rivero donos pli kaj pli multe da energio al la ĉina popolo.

En la kvin jaroj la distanco inter la nivelo de tiu industrio de Pekino kaj la internacia avangarda nivelo reduktiĝis je 10-15 jaroj. Kiel do progresis la televidila industrio de Pekino?

Iutage de la malfrua printempo de 1979 Hūang Zonghan, nova estro de la televidila fabriko Dongfeng en Pekino, elmetis sian supozon antaŭ la oficistoj kaj laboristoj de la fabriko:

“En la kuranta kaj venonta jaroj ni turnu deficiton en profiton kaj strebu du aŭ tri jarojn por gajni milionon da jŭanoj da jara profito.” “En unu aŭ du jaroj ni havu jaran produktopovon de 150 000 televidiloj kaj en dek jaroj 400 000 — 500 000.”

La televidila fabriko Dongfeng kun plej longa historio en Pekino estis fondita en 1971 kaj ekfunkciis en la sekvanta jaro. Dum sep jaroj ĝi produktis nur unu tipon kun jara produktokvanto de iom pli ol 40 000. Kaj ĝi havis deficiton duoble kiom sia konstrua kosto. Ja ne estis facile realigi la supozon!

Tamen ĝi efektiviĝis. En tiu jaro la fabriko importis eksterlandajn avangardajn teknologiojn, ekipaĵojn kaj televidilan tipon per kompensa negoco kaj prilaboro de televidilaj pecoj por eksterlandaj firmaoj. La nova teknologio liberigis la fabrikon de la manlaboro kaj aperis moderna produktolinio. La linio elfaras unu televidilon en 47 sekundoj, t.e. ĉiu skipo povas produkti 600 televidilojn, kiuj superis ĝian monatan produktokvanton antaŭ 1979. La fabriko fine kovris la deficiton. En 1980 ĝi produktis pli ol 180 000 12-colajn nigrajn-blankajn televidilojn kaj donis al la ŝtato kvin milionojn da jŭanoj (2.5 milionoj da usonaj dolaroj) kiel profiton.



*Muntado*

La alia, la Pekina Televidila Fabriko, konstruiĝis en 1976 kun jara produktopovo de 50 000 televidiloj, inkluzive de 15 000 koloraj televidiloj. Sed la kolora televidilo ĉiam restis studata. En 1980 la fabriko importis per ŝtata pruntedono internacie avangardan kolortelevidilan produktolinion kaj kompletan da elementoj por 14-colaj koloraj televidiloj. La linio povas produkti 150 000 televidilojn jare.

Ankaŭ la fabrikoj de elektroj elementoj kaj aparatoj importis ĉefajn teknologiojn kaj ekipaĵojn por produkti liniajn transsendajn transformatorojn, radiofrekvencajn kapojn kaj bildtubojn. Ekzemple, la Pekina Kvina Televidil-elementa Fabriko, kiu antaŭe produktis nur 12-kanalajn altfrekvencajn kapojn, fariĝis unua produktanto de tutkanalaj altfrekvencaj kapoj en Ĉinio. La impeto de produktado de televidilaj elementoj kaj aparatoj kreis kondiĉojn por anstataŭigi impor-

titajn elementojn per ĉinaj altkvalitaj.

En la lastaj du jaroj la Pekina Televidila Fabriko produktis ne nur centmilojn da televidiloj, sed ankaŭ projektis, elfaris kaj vendis kvar televidilajn produktoliniojn kunlabore kun aliaj fabrikoj. La linioj estis provizitaj per novaj teknikoj kaj atefikaj mezuriloj. Ĉiu skipo produktas 400 — 600 televidilojn.

Antaŭ kelkaj jaroj la Pekina Televidila Fabriko projektis unu produktolinion. Ĝi elspezis milionon da jŭanoj por konstruado de la linio kaj ĝiaj fakuloj dediĉis kvin jarojn al tio. Sed pro la postĝinta projektado la linio ĉesis labori nelonge post sia ekfunkcio.


Estas interese, ke la produktolinioj de ambaŭ specoj estis projektitaj de teknikisto Ĝoŭ Jubin. Li diris al ni, ke kiam li projektis la unuan linion, la televidila industrio en la lando an-



koraŭ estis en manlabora stadio. Modernan produktolinion li eĉ ne vidis. Li komencis sian projektadon, vizitinte tiajn liniojn de aliaj industriaj branĉoj. La enkonduko de alilandaj avangardaj televidilaj produktolinioj plivastigis lian vidkampon. Kun plena memfido li diris al ni: "Nun ni jam havas certecon por sukcese projekti internacie avangardan televidilan produktolinion."

La daŭro de senperturba funkciado de la nigraj-blankaj televidiloj produktitaj de ambaŭ fabrikoj superis la normojn difinitajn de la ŝtato por bonkvalita produktaĵo. La fabrikoj elfaris televidilojn kun markoj "Kunlun B-3110", "Kunlun B-352" kaj "Mudan 31-H-8", aplikante novan teknikon alilandan. La televidilo "B-3110" je 0.5 kilogramo malpli pezas ol la samspecaj produktaĵoj de aliaj landoj kaj konsumas elektron je 3.5 vattoj malpli multe ol ili. Ĝia longdistanca ricevkapablo estas kontentiga. Tiuj produktaĵoj estas ne nur ŝatataj de enlandaj klientoj, sed ankaŭ eksportataj en landojn de Azio kaj Eŭropo.

En nur kelkaj jaroj al la televidila industrio de Pekino okazis rimarkinda ŝanĝiĝo. Lastatempe respondeculo de la Pekina Televidila Fabriko diris al ni, ke ili duobligis la produktokvanton de koloraj televidiloj en la kuranta jaro kaj ekfunkciigos alian kolor-televidilan produktolinion en la venonta jaro por kontentigi la ĉiam kreskantan bezonon de klientoj.



*En la ŝtata akvoproduktaĵa vendejo Hajĝumin*

**ĈEN SĴAŬĴJUN:**

## Provizado de akvoproduktaĵoj en Kantono

**A**NTAŬ kelkaj jaroj mi vojaĝis al Kantono. Kontraŭ la hotelo, kie mi loĝis, estas ŝtata vendejo de akvoproduktaĵoj. Ĉiumatene, antaŭ ĝi estis longa vico da atendantoj por aĉeti fiŝojn. Oni diris al mi, ke la tieaj loĝantoj ŝatas fiŝojn, precipe la freŝajn. Tamen freŝaj fiŝoj estis nemultaj en la vendejoj. Tial oni devis tre frue vikatendi antaŭ la vendejoj.

Antaŭ nelonge mi refoje vojaĝis tien. Estis tute ekster mia atendo: En la urbo ĉiuj vendejoj de akvoproduktaĵoj kaj legomoj

havas sufiĉan kvanton da freŝaj kaj vivaj fiŝoj por vendi. Iuj vendejoj vendas tranĉaĵojn el fiŝoj, por ke la klientoj elektu ilin laŭplaĉe. Iuj vendistoj eĉ buĉas vivan fiŝon por la klientoj. La fiŝoj estas multspecaj: ne nur fiŝoj produktitaj en tieaj lagoj kaj riveroj, sed ankaŭ famaj specoj de aliaj provincoj. Ĉirkaŭ 70-80 specoj estas aĉeteblaj. Laŭ statistiko de koncernaj departementoj, en 1983 oni liveris al Kantono 75 milionojn da kilogramoj da akvoproduktaĵoj, 3-4-oble tiom en 1978. Tial la 2.5 milionoj da loĝantoj ĉiu havas meznombro



*En privata akvoproduktaĵo-butiko*

32.5 kilogramojn da akvoproduktaĵoj. Urbanoj ĝoje diris: “Neniam ni aĉetis fiŝojn tiel facile kiel nun.”

Kio kaŭzis tiel grandan ŝanĝiĝon al la akvoproduktaĵa livero en Kantono? Kun tiu demando mi vizitis la urban akvoproduktaĵan kompanion. Ĝia direktoro Ji Ĉunjan diris al mi, ke la kaŭzo kuŝas en tio, ke oni efektivigas novan politikon por prosperigi la merkaton enlande. Krom laŭplana fikspreza provizo fare de la ŝtataj vendejoj, la ŝtato permesas al ili aĉeti kaj vendi produktaĵojn per marĉandado. En la pasinteco la akvoproduktaĵoj ĉiuj estis monopoligitaj de la ŝtato. Nun la ŝtataj vendejoj daŭre okupas la ĉefan pozicion en komercado, tamen la ŝtato samtempe plene disvolvas kolektivajn kaj individuajn ekonomion, malfermis fiŝbazarojn en la urbaj kvartaloj, kie kamparanoj povas vendi fiŝojn. Nun en la tuta urbo troviĝas pli ol 200 ŝtataj kaj kolektivaj vendejoj de akvoproduktaĵoj

kaj 500 individuaj akvoproduktaĵ-butikoj. Kaj en la urbo estas 30 foiroj de agrikulturaj produktaĵoj ĉiu kun fiŝbudoj. Tiuj ekonomiaj formoj kaj kanaloj ne nur altiras al la urbo kamparanojn de diversaj lokoj por liveri fiŝojn, sed ankaŭ akcelas disvolviĝon de fiŝprodukto. La antaŭa politiko katenis la merkaton, tial la kamparanoj havis nenian memdecidan rajton kaj estis ne aktivaj en la produktado. Sed nun regis tute alia fenomeno: Kamparanoj povas libere vendi siajn superflujajn produktaĵojn, post kiam ili plenumas la taskojn difinitajn de la ŝtato. Tial ili havas altan aktivecon en produktado. Antaŭe la produktokvanto de la dolĉakvaj fiŝoj de Kantono longtempe stagnis. En la lastaj jaroj la fiŝbredado en la dolĉa akvo disvolviĝis rapide dank’ al la novaj ekonomiaj politikoj. En 1983 la produktokvanto de fiŝoj atingis 17 500 tunojn, pliiĝis je 8 500 tunoj kompare kun tiu en 1978. Tial en la vendejoj estas pli multo da fiŝoj.

Por ke la merkato estu vigla sed ne malorda, komence la kompanio fondis provizejojn, kiuj liveras al si kaj aliaj vendejoj abundajn akvoproduktaĵojn. Nun en la tuta urbo jam eklaboris ŝtataj provizejoj de peklitaj fiŝoj, river-, lag- kaj mar-fiŝoj k.a. Unuflanke, la kompanio faras peradon kaj aliflanke, ĝi mem vendas akvoproduktaĵojn kaj organizas ilian cirkuladon. Nun la tieaj akvoproduktaĵoj vendataj de kolektivoj kaj individuoj plejparte estas pogrando aĉetitaj de la ŝtataj provizejoj, kiuj jam fariĝis komerca centro de la akvoproduktaĵoj en la tuta urbo.

Je la tria matene de la sekvanta tago, kun granda intereso mi vizitis river-fiŝan provizejon. Kompare kun la fiŝbazaroj, tie regis tute alia aspekto: La bruado de homoj kaj ĉaroj atingis miajn orelojn jam de centoj da metroj. La ĉaroj plenaj de fiŝoj venis unu post alia. En la kanvasaj kestoj vigle saltis vivaj fiŝoj. Aĉetistoj de ŝtataj vendejoj, kolektivaj butikoj kaj restoracioj kaj detalistoj elektis por si la bezonatajn fiŝojn. Respondeculo de la provizejo diris al mi: “Nia ĉefa tasko estas pogrando aĉeti kaj vendi fiŝojn marĉandante. Ĉiujare nia vendovaloro povas atingi 40 milionojn da jŭanoj (egale al 20 milionoj da usonaj dolaroj). Ĉe ni estas pli ol 70 specoj da fiŝoj.” Tion dirinte, li prezentis al mi karton, sur kiu estas skribitaj la komerca sfero de la provizejo, liverado de informoj de la akvoproduktaĵoj kaj aranĝo de loĝejo kaj manĝo por la klientoj.

Post kvar horoj reaperis kvieto en la provizejo. La aĉetistoj foriris unu post alia kaj urĝe iris al bazaro aŭ vendejo kun ĉaroj, sakoj aŭ korboj plenaj de fiŝoj.



# EKZEMPLO DE KURAĜULO

## — Pri riĉa rikolto sur salalkala kampo

**I**UTAGE sur muro de la korto de la Hŭajhaj-a Kultivejo de Ĝjansu-provinco aperis jena anonco: “Kiu volas kontrakti pri 31.5 hektaroj da rizkampo, bonvolu sin anonci, kondiĉe ke la hektara produktokvanto atingos 4 500 kilogramojn; se la kontraktanto superplenumos tiun normon, li ricevos ok fenojn (unu feno = centono de ĵŭano) el ĉiu superrikoltita kilogramo da rizo.” Informiĝinte pri tio, multaj kultivistoj venis por ĝin rigardi. Bedaŭrinde, ke oni kapneis kaj ne kuraĝis fari kontrakton, ĉar la grundo estis pli salalkala. Preskaŭ en ĉiu pasinta jaro la rikolto akirita de la kultivejo sur tiu kampo ne kovris la pagitajn laboron kaj produktokostojn. Inter la rigardantoj troviĝis pli-ol-40-jara akvomastromanto Caŭ Tongŝan. Kvankam li nenion diris, tamen en lia koro jam ardis fervoro por la afero.

“Ĉu ni faros kontrakton pri tiu rizkampo?” vespere sonde demandis Caŭ al sia edzino. “Vi freneza! Vi ne volas plu vivi bonan vivon?” tuj kontraŭparolis la edzino. Ankaŭ ilia 20-jara filo Caŭ Bin deadmonis: “Paĉjo, la normo estas tro alta, ni ne risku.” Sed Caŭ Tongŝan, firma en la ideo, kunvokis la tutan familion. Li diris: “La grundo, kompreneble, estas iom malgrasa, tamen mi havas sperton en akvomastromado. Se nur ni klopodos por prilabori ĝin, mi pensas, ni certe ricevos indan repagon.” Fine li konvinkis sian familion.

La informo pri tio rapide disvastiĝis tra la tuta kultivejo. Estis malsamaj opinioj pri tiu afero. Iuj laŭdis lian kuraĝon, aliaj malvarme diris: “Caŭ Tongŝan tro riskema, ni vidu, kio sekvos en ĉi aŭtuno!” “Diablo lin prenu! Li certe perdos sian tutan havon en la jarfino!” Tiuj vortoj neniel ŝancelis lian firmecon. Pro manko de laborfortoj li elektis du laboristinojn el la produkta grupo kiel siajn helpantinojn.

Tiel fondiĝis kvin-membra grupeto kun Caŭ kiel la ĉefo, kaj ĝi kontraktis kun la produkta grupo pri tiu rizkampo.

Kvankam la kontrakto estis farita, tamen ili bone komprenis, kiel peza tasko falis sur iliajn ŝultrojn.

Printempe la temperaturo estis malalta, sed Caŭ Tongŝan kaj aliaj membroj jam komencis sian laboron sur la kampo. Por 31.5 hektaroj da rizkampoj ili devis ĝermigi pli ol 5 000 kilogramojn da rizosemo en kelo. La ĝermigado estis peniga laboro: Oni devis tagnokte fari prizorgadon en kelo, vektporti akvon por mergi rizosemon kaj moderigi la temperaturon. Ĉia preteratento povus malhelpi al plantidoj kreski. Caŭ Bin memvole ekloĝis en la kelo, kie li kuŝis sur sternita pajlo. Pasis pli ol 20 tagoj, kaj elkreskis plantidoj. Samtempe kun tio, Caŭ Tongŝan gvidis la aliajn membrojn en ter-ebenigado, kampeĝo-farado kaj fosado de irigaciaj kanaletoj. En la dua tagdeko de majo, kiam iris intensa transplantado de rizplantidoj, iu masonita akvedukto disfalis kaj perdis multe da akvo. Tiam akvo tre kara ne malhaveblis por la rizkampo. Ĝuste en tiu kriza momento alvenis tien respondeculo de la kultivejo kaj interkonsiliĝis kun Caŭ pri konstruado de akvobaraĵo. Ili organizis pli ol 30 homojn por porti ŝtonojn kaj teron. Ili laboris en la kampo du tagojn kaj du noktojn. La sukcesa riparo ebligis al ili daŭran transplantadon. Por eviti novan eventualaĵon, Caŭ Tongŝan gardis kelkajn noktojn en provizora budo ĉe la kanalo anstataŭ ripozi hejme.

3-5 tagojn post la plantado ili ankoraŭ ne liberigis sin de la peza laboro, sed jam alfrontis novan provon: Flaviĝis la plantidoj. Caŭ eltiris kelkajn el ili por observi. Li trovis, ke ilia in-



*Caŭ Tongŝan kaj liaj familianoj en reformado de salalkala kampo*

terna parto restas ankoraŭ vivanta kaj la flaviĝo estas kaŭzita de troo da salo kaj alkalo en la kampo. Ili do irigaciis la kampon por sensaligi ĝin. Post unu semajno verdiĝis la plantidoj. Unu monaton poste, la plantidoj jam kreskis ĝis duonmetro. Sed en la dua tagdeko de julio pluvegis tritage sinsekve. La kampo fariĝis vasta akvejo, kaj leviĝis super la akvo nur la pintoj de la plantidoj. Iu bonkorulo diris: "Malfeliĉo venos al Caŭ." En tiu malfacila momento la respondeculo de la kultivejo denove mobilizis siajn laboristojn por dreni la kampon. Tio profunde kortuŝis Caŭ Tongŝan, kiu fariĝis des pli energia. Post kelkaj tagoj la tuta kampo estis drenita, escepte de duonhektaro en kava loko. Gvidate de Caŭ Tongŝan, la grupanoj elĉerpis la akvon per pelvoj. Post tio, teknikisto donis al ili konsilojn por sterki kaj mastrumi la kampon per sciencaj metodoj en malsamaj periodoj de kreskado. Dank' al sterkado la plantoj dike spikiĝis.

Venis aŭtuna rikolto.


Antaŭe en la rikolta tempo nenia vigleco regis sur tiu malfekunda kampo, sed ĉi-jare prezentiĝis viveca sceno: homoj ĝoje falĉis rizplantojn kaj traktoro transportadis ilin al la draŝejo fojo post fojo. Tiam multaj kultivistoj svarmis tie, kiel por rigardi la anoncon en la printempo.

Post draŝado komisiito de la kultivejo kontrolis kaj pesis la rizon. La emociita Caŭ Tongŝan notis la kvanton de rizo sako post sako. La

hektara produktokvanto atingis 5 100 kilogramojn kaj la totala 160 000 kilogramojn, kiuj multe superis la normon. Akirinte la riĉan rikolton, la grupeto laŭkontrakte donis pli ol 3 200 jŭanojn el la totala profito al la ŝtato kaj kolektivo, kaj ĝiaj membroj dividis la reston inter si kaj ricevis po 477 jŭanojn.

Antaŭe, kvankam la 6-membra familio de Caŭ ŝuldis al neniu, tamen restis al ĝi nur tre malmulte da mono en la jarfino. Kaj nun, krom sia difinita salajro, la familio ricevis ankaŭ premion de pli ol 1 400 jŭanoj. Caŭ Tongŝan ĝoje aĉetis televidilon kaj magnetofonon kaj deponis la restajn pli ol 700 jŭanojn en banko.

Kurantjare la grupeto de Caŭ Tongŝan kun plena memfido faris novan kontrakton pri 40 hektaroj da rizkampo kaj strebas al totala produktokvanto de 200 000 kilogramoj.





## OFICIALE EKFUNKCIIS LA ĈINGHAJ-A FERVOJO

La 1-an de majo oficiale ekfunkciis la Ĉinghaj-a Fervojo, unu el la plej altaj fervojoj en la mondo. Ĝi kun longo de 834 kilometroj komenciĝas de Ŝjining, la ĉefurbo de Ĉinghaj-provinco, etendiĝas tra Ĉajdam-baseno, kaj finiĝas ĉe Golmud, nova urbo ĉe la piedo de Kunlun-montaro. Parto de la fervojo, kiu havas longon de 32 kilometroj, estas konstruita sur la sallago Ĉarhan plej granda en Ĉinio kun areo de 5 856 kvadrataj kilometroj. Tie sterniĝas vasta regiono kun kavoj kaj salgrundo terure korodema al ordinraj fervojo-konstruaj materialoj. La ĉinaj sciencistoj sukcese alprenis serion da teknikaj rimedoj kaj uzis korodimunajn materialojn, tiel ke la parto de la fervojo restas stabila kaj fortika de post sia finkonstruiĝo en 1979 kaj estis aprobita post ekspertizo.


## LA PLEJ GRANDA KARBOAPARTIGEJO FUNKCIIGATA

La plej granda karboapartigejo Fangeĝuāng de Kajlūan-karbo minejo en Ĉinio, kiu povas lavi 4 milionojn da tunoj da karbo ĉiujare, ekfunkciis en la mezo de majo ĉi-jare.

La karboapartigejo kun totala plankareo de 41 000 kvadrataj metroj situas pli ol 200 kilometrojn nordoriente de Pekino. Ĝiaj ekipaĵoj estis importitaj el FR Germanio kaj laboras dank' al avangarda karbo-apartiga teknologio. Ĝiaj ĉefaj ekipaĵoj kaj produktado estas regataj de komputero.

## AEROPLANA ARBOSEMADO EN ĈINIO

En la unuaj kvar monatoj ĉi-jare ĉ. 547 000 hektaroj en suda Ĉinio



*La Ĉina Virina Volana Teamo gajnis Uber-pokalon.*

estis prisemitaj aeroplanoj, 1.52-oble pli multe ol en la sama periodo de 1983.

La provincoj Hebej, Ljaŭning, Ŝanŝji kaj la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio faras aeroplanan arbosemadon. Estas espereble, ke en la kuranta jaro la totala areo aeroplano prisemita en Ĉinio superos 660 000 hektarojn.

Nun ĉ. cent aeroplanoj faras tian prisemadon en suda kaj norda Ĉinio.

## SUKCESO EN REGADO DE FETA ANEMIO

Ĉinaj medicinistoj trovis efikan metodon diagnozi heredan anemion de fetoj per speciala gena sondilo. La alfa mediteranea anemio, karakterizita per manko de hemoglobino en sango, povas kaŭzi morton pro sistola debiliĝo aŭ komplika infektiĝo.

Per alfa-zeta gena sondilo oni povas akiri pli ĝustan rezulton ol per alfa gena sondilo, ofte uzata en- kaj eksterlande.

Per tiu nova metodo medicinistoj sukcese faris diagnozon al dek unu gravedulinoj. Dank' al tiu

metodo sanan bebon naskis virino, kies tri antaŭaj beboj havis tian genon.

## MALGRANDA TELEVIDSTACIO KONSTRUITA DE KAMPARANOJ

Malgranda televidstacio kun povo de 2-3 vattoj aperis lastatempe en Liŭĝuāng fama ĉina bonhava vilaĝo de Ĉjilijing-distrikto, Ŝinŝjang-gubernio, Henan-provinco. Ĝia radioelsendo kovras pli ol tri kvadratajn kilometrojn. Nun 215 familioj en la vilaĝo kaj familioj en la najbaraj vilaĝoj povas klare vidi ĝiajn programerojn kaj la de ĝi resenditajn bildbendajn programerojn.

En 1983 la jara pokapa enspezo de Liŭĝuāng-vilaĝo estis 3 240 jŭanoj. Antaŭ nelonge ili aĉetis superleĝeran aeroplanon "Abelo n-ro 3" kaj unu kompletan de miniatura komputero "Ziĝin n-ro 2".

## SPECIALAJ MUZEOJ EN ĈINIO

Por plimultigi la nombron de la pli ol 500 muzeoj ekzistantaj en Ĉinio oni preparas sin por konstrui muzeojn agrikulturajn, poŝtajn kaj telekomunikajn, poŝtmarkajn, presartajn, karbajn kaj tek-

## Mikronoveloj

En tiu ĉi rubriko ni aperigas recenzojn pri Esp-ajoj, kiujn la eldonistoj sendis al ni po-du-ekzemplere, kaj nur mencias tiujn ricevitaĵojn po-unu-ekzemplere. Ni ankaŭ bonvenigas recenzojn faritajn de alilandaj seriozaj samideanoj kaj ilin rekomencas pro la kontribuajtoj per niaj Esp-aj eldonaĵoj aŭ ĉinaj metiartaĵoj. La redakcio ne prenas sur sin la respondecon pri la laŭdoj aŭ kritikoj de la recenzantoj.

LA RED.

**MIKRONOVELOJ DE SIN'ITI HOSI** tradukita el la japana fare de Kikunobu Matuba, eldonita de **LIBROTEKO-TOKIO**. Formato: 13 × 18 cm. 76 p. Prezo ne montrita.

Jen kolekto de 14 el la centoj da noveletoj (mikronoveloj) verkitaĵoj de la japana "majstro de mikronovelo". (Oni diras, ke mikronovelo estas treege mallonga noveleto el malpli ol 1 500 vortoj sed devas enhavi ĉian esencon propran al novelo.) Unu noveleto el la kolekto rakontas pri terure soifaj veturantoj en kosmo-

ŝipo, kiuj trafis, post serĉado, planedon tute kovritan de akvo, sur kiu ili ne povis "surteriĝi". Alia temas pri amata horloĝo, kiu savis la vivon de sia posedanto pro tio, ke "io ne estas orda en ĝi" kaj sekve li feliĉe ne veturis per la buso, kiu rulfalis en valon. Tria pri "grandioza plano" de entrepreno sendi spionon en sian rivalan kompanion, ke li raportu gravajn sekretojn pri ĝi kaj ĝin venki. Sed la komisiito rapide promociiĝis, fariĝis bofilo de direktoro de tiu kompanio kaj fariĝinte ĝia prezidanto fine bankrotiĝis la komisiintan kompanion. Kvara pri flegistino, kiu informi-

stilajn, tiujn pri la historioj de medicino, elmigrintaj ĉinoj kaj naciecoj kaj ankaŭ tiujn pri historiaj eminentuloj.

Ĉinio faras ĉion eblan por ke 289 urboj ĉiu havu sian muzeon en 1990 kaj la diversaj departementoj ĉiu sian fakan muzeon.

Ekde 1976 Ĉinio ĉiujare konstruis 20-30 novajn muzeojn kaj 58 tiajn muzeojn en 1983.

### **APEROS "KOLEKTITAJ VERKOJ DE BALZAC" EN LA ĈINLINGVA ELDONO**

Por celebri la 190-an datrevenon de la naskiĝo de Honoré de Balzac, la Popola Literatura Eldonejo de Ĉinio eldonos en volumoj "Kolektitaj Verkoj de Balzac" ekde 1984.

La verkaro konsistos el ĉ. 30 volumoj, inkl. de "La Homara Komedio" (25 volumoj), farsoj (unu

volumo), dramoj (unu volumo), traktaĵoj, eseoj kaj aliaj verkoj (2-3 volumoj), sume kun 11 milionoj da ideografiaĵoj. Laŭ la plano "La Homara Komedio" kun ĉ. 9 milionoj da ideografiaĵoj fineldoniĝos en 1989. Tio estas la unua fojo, ke Ĉinio eldonos kolekton da verkoj de Balzac.

### **ĈINAJ MARŜISTINOJ ROMPIŜ DU MONDAJN REKORDOJN**

Inter la 5-a kaj 26-a de majo ĉinaj marŝistinoj partoprenis la internaciajn konkursojn okazintajn en Norvegio, Danlando, Svedio kaj Italio. En la konkursoj ili rompis la mondajn rekordojn de la 5-kilometra kaj 10-kilometra virinaj marŝoj sur kurejo kaj akiris la plej bonan mondan noton de la 5-kilometra virina marŝo. En la konkursoj ili gajnis 7 individuajn ĉampionecojn, 4 subĉampionecojn kaj tri teamajn ĉampionecojn.

### **LA ĈINA VIRINA VOLANA TEAMO GAJNIS ĈAMPIONECON DE LA MONDA TEAMA VOLANA ĈAMPIONECA KONKURSO**

Vespere de la 17-a de majo la Ĉina Virina Volana Teamo, kiu unuafoje partoprenis la Mondan Teaman Volanan Ĉampionecan Konkurson, venkis la anglan teamon per 5:0 en la finalo okazinta en Kuala-Lumpuro kaj gajnis Uber-pokalon.

### **EKSTERLANDAJ ARTISTOJ EN ĈINIO**

En majo ĉi-jare la Perkut-instrumenta Orkestro kaj la Granda Balet-trupo de Kanado, la Sidneja Kord-kvarteta Trupo de Aŭstralio, la hinda dancista trupo kaj hungara kantista kaj dancista trupo venis unu post alia al Ĉinio. Ili ĉiuj per sia originala kaj belega prezentado gajnis varman aplaudon de la ĉinaj spektantoj.



ĝinte pri baldaŭa morto de entreprenisto, sin turnis al lia rivalo, asertis, ke ŝi estas murdistino kaj povas mortigi por li la malamikon sen risiko de arestiĝo, kaj per sia ruzo ŝi sukcesis akiri monon. Kvina pri laboranto en la jaro 2050 priservata kaj flegata de robotoj kvazaŭ fadenpupo en pupteatro eĉ post sia morto. . .

Post resumo de parto de la interesaj rakontoj, ni aŭskultu diron de la aŭtoro por koni liajn principojn: “Nenian kadron mi metas sur la materialoj de miaj verkoj, sed ekzistas la restriktioj de mi mem donitaj. Unue mi ne priskribas seksaĵon nek murdon, due ne rakontas pri aktualaĵoj nek pri sociaj moroj, kaj trie ne praktikas abstraktisman metodon. . .” Kaj s-ro Ken Hayasi en sia artikolo pri la aŭtoro diras: “Liaj verkoj, surbaze de nihilisma inklino, atentigas nin ankaŭ per iel akra kritikeco pri la modernaj viv-fazoj. Ili neniel estas ĉiam dolĉaj, sed ofte amaraj. Alivorte ili enhavas ne nur frandaĵon, sed ankaŭ venenon. . .”

Mi konstatis, ke la 14 noveletoj elektitaj kaj esperatigitaj de s-ro Kikunobu Matuba sufiĉe bone montras al ni la tendencon de la aŭtoro. Same kiel la strangaj ilustraĵoj (korvo-similaj birdoj), kiuj malagrabla impresas sur 8 el la 76 paĝoj, moka grimaco de la aŭtoro aperadas de tempo al tempo al mi dum la legado. La literaturaj verkoj ja spegulas homajn aktivadojn de la socio. Kredeble la rakontoj de S-ro Sin’iti Hosi prezentas al ni pli malpli fidelan bildon de facetoj de la socio en kiu li vivas. Estas pripensinde, kial li, vivanta en lando staranta alte en la modernaj teknologioj, ricevis tian kritikemon kaj mokemon. Sendube ankaŭ kritikoj kaj mokoj estas

necesaj por savi la homojn de eraroj kaj malfeliĉoj, tamen tio ja ne sufiĉas por ŝanĝi la situacion, kiu kaŭzas la bezonon de kritikoj kaj moko. Eble estas malfacile por verkisto, kia s-ro Sin’iti Hosi, montri al siaj kunuloj ĝustan vojon por eliri el ĝi.

Koncerne al la fideleco de la Esperanta traduko far s-ro Kikunobu Matuba mi povas diri nenion pro nekono de la originalo. Lia lingvo estas flua kaj klara. Ĝi estas taŭga legaĵo por la progresantoj pro siaj mallongaj interesaj rakontoj kaj bonstila lingvaĵo. Mi volas rimarkigi nur pri unu dubinda punkto, nome en ĝi estas kelkaj ekzemploj de uzo de akuzativo anstataŭ prepozitivo. Ekzemple, en p. 3 “vi ne revenos la Teron”, en p. 6 “Pensado sola nenion utilas”, p. 19 “mi venis la lokon”, p. 22 “kiu. . . venis el provincour-



bon”, p. 26 “Tia eta krimo ja ne konvenas min!” Tia formo estus akceptebla en poezia verko en kazo de nepra neceso, tamen mi dubas pri ilia dezirindeco en prozo.

Recenzis LAŬLUM

## Nova Praktika Kurso de Esperanto

**PRAKTIKA KURSO DE ESPERANTO** lernolibro por nederlandanoj, eldonita de la Asocio de Laboristaj Esperantistoj FLE. Formato: 15×21 cm. 158 p. Prezo: £12.50 inkluzive de afranko. Mendebila ĉe la eldoninto (adreso: Leidsevaart 52, N L 2114 A D Vogelenzang, Nederlando).

La kurso laŭ traduka kaj gramatika metodo interesas per siaj praktika enhavo, humuraĵoj, proverboj, ilustraĵoj prilingvaj kaj fotoj pri Esperantaj libroj kaj utilaj vortolistoj aldonitaj al la lecionoj. Menciinda ankaŭ estas la aldono de horaroj de la ĉiutagaj Esperantaj disaŭdigoj de Radio Pekino kaj Radio Polonia kaj

informo pri la brazila Esperanto-komunumo Bona Espero. Kredeble tio kondukos la kursanojn en la Esperanto-movadon. Mi kredas, ke Esperanto estas multe pli facila por eŭropanoj ol por ni ĉinoj, tamen mi timas, ke estas tro multe eĉ por nederlandanoj lerni parkere pli ol 100 vortojn en unu fojo post ĉiu leciono. Mi trovis ankaŭ kelkajn erarojn ne tre gravajn en la presaĵo. Ĉu la proverbo sur p. 100 "Kie estas vojo, tie estas volo" estas ĝusta? Ĉu oni ne devus diri anstataŭe "Kie estas volo, tie estas vojo"?"

Recenzis LAŬLUM



### NOVE RICEVITAJ LIBROJ

**METODIKO EN LA PRAKTIKO** kolekto de artikoloj pri instruado de Esperanto eldonita de la Hungara Esperanto-Asocio. Formato: 14 × 21 cm. 122 p. Prezo: 15 gld.

**VILAĜO BOROVO** romano de Krum Velkov, tradukita de Asen Grigorov el la bulgara, eldonita de la Hungara Esperanto-Asocio. Formato: 14 × 20 cm. 130 p. Prezo: 12 gld.

**LA NOBLA KORANO** el la araba tradukis prof. d-ro Italo Chiussi. Dua eldono de TK, Dan-

lando. Formato: 16 × 22 cm. 668 p.

**PLENA ESPERANTO-PERSA VORTARO** de B. Samimy. Formato: 17 × 24.7 cm. 754 p. Prezo ne montrita.

**ENKONDUKO EN LA KULTURON** serio de mimeografie presitaj kajeroj verkitaj plejparte de Agostinho da Silva kaj tradukitaj el la portugala lingvo fare de Jose de Freitas Martins k. a. Formato: 15 × 21 cm. Ni jam ricevis 16 kajerojn pri Edisen, Van Gogh, pierre Curie kaj aliaj eminentuloj kaj pri petrolo, lungaso k. a. temoj.

**TIMUR KAJ LIA TAĈMENTO** romano de A. Gajdar, tradukita de E. S. Pervertajlo kaj R. Grinŝpan el la rusa, eldonita de la Hungara Esperanto-Asocio. Formato: 14 × 20 cm. 72 p. Prezo: 10 gld.

**SUR KAMPO GRANITA** originala romano de István Nemere, eldonita de la Hungara Esperanto-Asocio. Formato: 14 × 20 cm. 127 p. prezo: 15 gld.

**ETULAJ AVENTUROJ** kolekto de originalaj noveloj de Zora Heide, eldonita de Forfattaress Bokmaskin. Formato: 14.5 × 21 cm. 104 p. Prezo ne montrita.

### Horaro de la Ĉiutaga Esperanta Disaŭdigo de Radio Pekino

Pekina Tempo	GMT	Al Regionoj	Ondoj (m)	kHz
4:00-4:30	20:00-20:30	Eŭropo	40.1	7470
			26.2	11445
			30.1	9965
6:30-7:00	22:30-23:00	Latin-Ameriko	19.2	15600
			26.0	11515
19:00-19:30	11:00-11:30	Japanio, Koreio	19.8	15100
			30.3	9880
21:00-21:30	13:00-13:30	Sudorienta Azio	19.7	15165
			25.6	11685



# LERNEMULO

**E**N la antikva Ĉinio estis fama strategiisto Ĝang Ljang. Dum sia juneco li estis tre lerna kaj ĉiam modeste konsultis aliajn. Nun ankoraŭ cirkulas rakonto pri lia lernemo.

Iun tagon li promenis ĉe pontofino kaj trovis, ke tie sidas maljunulo. Kiam li proksimiĝis al la maljunulo, la lasta retiris siajn piedojn kaj defaligis ŝuon sub la ponton.

“Knabo, iru malsupren kaj levu la ŝuon por mi,” la maljunulo diris ordone.

Ĝang Ljang mezuris la maljunulon per la okuloj kaj vidis, ke li aspektas eksterordinara kaj multescia. Li senhezite kuris suben kaj reportis la ŝuon.

La maljunulo sendanke etendis sian piedon kaj diris: “Surmetu!” Ĝang Ljang surgenuie metis la ŝuon sur lian piedon. La maljunulo foriris, ridete karesante sian barbon.

La lernema Ĝang Ljang sekvis lin paŝon post paŝo. Irinte kelkan tempon, la maljunulo sin turnis al Ĝang Ljang kaj diris: “Vi estas vere multepromesa knabo, mi volonte lernigos vin.” Aŭskultinte tion, Ĝang Ljang tuj genuiĝis antaŭ la maljunulo kaj nomis lin majstro. La maljunulo diris: “Renkontiĝu kun mi

frumatene post kvin tagoj ĉe la pontofino.” “Jes,” Ĝang Ljang tre ĝojis kaj dankis lin per riverenco.

En tiu tago Ĝang Ljang venis tre frue por la renkontiĝo, sed la maljunulo venis pli frue ol li. La maljunulo rimarkigis lin, ke lia malfruiĝo signifas mankon de sincereco por lerni, kaj postulis, ke li venu denove post aliaj kvin

tagoj. Pasis la tagoj. Ĝang Ljang ellitiĝis tuj ĉe kokokrio. Tamen li denove malfruiĝis kaj devis veni triafoje. Ĉi-foje Ĝang Ljang leviĝis jam noktomeze kaj atendis la maljunulon ĉe la pontofino en frosta vento. La maljunulo trovis lin sincera kaj donacis al li libron pri militarto. De tiam Ĝang Ljang diligente studis la libron tage kaj nokte kaj fine fariĝis fama strategiisto.



## ESPERANTA TAJPILO PRODUKTATA DE ĈINIO

Por la 71-a Universala Kongreso de Esperanto okazigota en Ĉinio en 1986 kaj antaŭenigi la ĉinan Esperantan movadon, iu tajpila farejo de Sanhajo, la plej granda urbo de Ĉinio, ekproduktis portebajn tajpilojn por Esperanto kaj la angla lingvo. Nun ili jam estas aĉetebaj en vendejoj.

## NOVAJ ESPERANTAJ ORGANIZAJOJ

En la 4-a kaj la 5-a de majo ĉi-jare okazis la inaŭgura kunveno por fondi la Sanming-an Junularan Esperanto-Asocion en la urbo Sanming, Fuĝjan-provinco. Tio estas la unua junula Esperanta organizo en Ĉinio. Nun pli ol 450 junuloj tie lernas Esperanton.

La 15-an de aprilo fondiĝis "Amikoj de Esperanto" de Gujlin,



*La inaŭgura kunveno de la Ljaŭjŭan-a Esperanto-Instituto*

la fama pitoreska urbo en suda Ĉinio. Ĝi certe favoros vojaĝon de esperantistoj en- kaj eksterlandaj.

La 20-an de aprilo ĉi-jare okazis inaŭgura kunveno por fondi la Ljaŭjŭan-an Esperanto-Instituton de Ĝjilin-provinco en la urbo Ljaŭjŭan. La kunvenon ĉeestis kaj salutis la lokaj partiaj kaj registaraj gvidantoj.

## ESPERANTA KORESPONDA KURSO EN NACIMALPLI- MULTAJ REGIONOJ

Por disvastigi kaj apliki Esperanton en medicino, la Esperanta

Asocio de la Ĉangĝji-a Huj-nacieca Aŭtonoma Subregiono de la Ŝingĝang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono funkciigis medicinan Esperantan korespondan kurson sub la aŭspicioj de la Eduka Buroo de la subregiono. En la kurso lernas 500 kuracistoj kaj aliaj medicinaj laborantoj. La kurso daŭros du jarojn.

La 20-an de majo ĉi-jare ekfunkciis la 1-a Koresponda Kurso de Esperanto aranĝita de la prepara grupo de la Esperanta Asocio de la Gŭangŝji-a Ĝŭang-nacieca Aŭtonoma Regiono. En la kurso lernas pli ol 500 personoj, kies plejparto estas lokanoj.



*La fondkunveno de la Sanming-a Junulara Esperanto-Asocio*



*S-ro Bakin intime interparolas kun s-ino Y. Isobe kaj s-ro Y. Umeda.*



### **BAKIN EN JAPANIO**

En majo ĉi-jare s-ro Bakin, prezidanto de la Ĉina Plumo-Centro, fama ĉina esperantisto kaj membro de la Honora Patrona Komitato de la Universala Esperanto-Asocio, veturis al Japanio, estrante delegacion de la Ĉina Plumo-Centro por

ĉeesti la 47-an kunvenon de la Internacia Plumo-Societo. En la bankedo en Tokio-Kaikan honore al tri ĉinaj delegacioj vizitantaj Japanion inkluzive de tiu de la Ĉina Plumo-Centro, famaj japanaj geesperantistoj Y. Isobe kaj Y. Umeda renkontiĝis kun Bakin.

### **ESPERANTAJ KURSOJ EN LA ĈINA POPOLA LIBERIGA ARMEO**

Gardplotono sub la 84651-a trupo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo garnizonanta en Ŝenŝji, okazigis duonjaran Esperantan kurson. Plejparto de batalantoj kaj komandantoj lernas en la kurso.

La aŭtoadministra lernejo de la Ĝenerala Provianta Departemento de la Ĉina Popola Liberiga Armeo ekfunkciigis Esperantan kurson, kiun vizitas 120 personoj el pluraj militaj regionoj, el ili pli ol 20 estas oficiroj regimentaj kaj pli altaj. Post la diplomiĝo kaj reveno al sia trupo ili disvastigos nian lingvon.

### **ESPERANTO-CENTRO NEDERLANDA DONACIS LIBROJN AL ĈINAJ E-KURSOJ**

En la daŭro de la tri monatoj jan. feb. k. mar. Esperanto-Centro Nederlanda donace sendis sinsekve al Ĉinio 18 pakaĵojn po 5 kilogramoj kun broŝuroj, revuoj, lernokaj legolibroj en Esperanto. 14 pakaĵoj el ili estis destinitaj por

### *Esperanto-kursanoj en Rosario de Argentino*



ĉinaj altlernejoj, kie regule funkcias E-kursoj.

La supre-menciitaj materialoj estis kolektitaj okaze de la Zamenhofa vespero pasintjare.

### ITALA KONGRESO DE ESPERANTO TEMOS PRI PEDAGOGIO

La ĉi-jara itala kongreso de Esperanto okazonta de la 8-a ĝis la 12-a de septembro en San Peligrino (Bergamo) pritraktos la pripedagogian temon: "Esperanto — konkreta sperto al internacia edukado". Universitataj instruistoj pri pedagogio, didaktiko, lingvistiko kaj sociologio prelegos pri la pedagogia valoro de Esperanto, pri ĝia utileco kiel propedeŭtika rimedo por lerni fremdajn kaj patrajn lingvojn, pri ĝia efikeco al interfratiĝemo ktp. Partoprenos la kongreson kiel observantoj ankaŭ spertuloj neesperantistaj.

Por aliĝo (senpaga por neitaloj) kaj informoj bv. skribi al: IEF, Via Villorresi, 20143 Milano, Italio.

### 12-HORA E-KURSO EN ARGENTINO

En Rosario (la dua plej grava urbo de Argentino) okazis en la

24-a kaj 25-a de marto ĉi-jare 12-hora E-kurso speciale destinita al sciencistoj kaj teknikistoj. En la kurso, gvidita de la prestiĝa germana sciencisto prof. Dro Helmar G. Frank, partoprenis preskaŭ 30 sciencistoj, precipe membroj de la cibernetik-pedagogia grupo de la Nacia Universitato de Rosario.

D-ro Frank restis en Rosario la tutan marton kaj gvidis kvar fakajn kursojn en la loka universitato, du el ili en la internacia lingvo. Estas unuafoje ke oni akceptis Esperanton kiel oficialan laborlingvon ĉe la argentina universitata medio.

La Rosaria Esperanto-Asocio surbendigis la kurson en aŭdvidajn kasetojn kunlaborante kun oficiala esplorinstituto.

### ALVOKO DE SKOLTA E-LIGO EN SVEDIO

La Skolta Esperanto-Ligo en Svedio sendas alvokon pri ĉies helpo al siaj ekspozicioj ekde nun ĝis Novembro 1984. Ili deziras kaj bezonas interalie fotojn, gaze-

tojn, insignojn, poŝtkartojn kaj markojn, flagojn, afiŝojn, emblemojn, glumarkojn, kaj ĉion pri viaj Esperanto-Asocioj, junularaj agadoj kaj geskoltaj agadoj. Bv. sendi al Skolta Esperanto-Ligo en Svedio. La kasisto Nilo Aloor Eksten, P.O. Kesto 4050, S-261 04 LANDSKRONA, Svedio.



NOVA GAZETO EN  
ESPERANTUJO—NOVA VOĈO

VOĈO DE  
HANDIKAPULOJ

Aperas 6-foje en la jaro. Ofsete presata. Luksa papero. Grafike moderna aranĝo. Enhave riĉa. Kunlaborantoj tra la tuta mondo!

Redaktas:

Dušan Adnadj kaj Vujadin Lukić

Jen aŭdu nian VOĈOn! VOĈO ne lamentas, ĝi: diskutas, rekomendas, provokas, malkovras, polemikas, helpas, proponas, rakontas, recenzas, konsilas, komentas, argumentas kaj movadumas.

Nia VOĈO estas io nova — VOĈO por ĉiuj — tio estas via VOĈO

Jarabono: 12.-DM, 5 US\$ aŭ egalvaloro. Jarabonon bonvolu direkti per poŝtenpagilo al adreso: "Voĉo" 56227-Borovo, Ŝkolska ul. 25, Jugoslavio. Al sama adreso estas bonvenaj viaj kontribuajoj kaj informoj.






Reprezentantoj de UEA kaj s-ro Baj Ĝjefu en interparolo

## Reprezentantoj de UEA en Pekino

Invite de la Ĉina Esperanto-Ligo, oficialaj reprezentantoj de la Universala Esperanto-Asocio s-ro Y. Umeda, ĝia vicprezidanto, kaj s-ro S. Milojeviĉ, ĝia ĝenerala direktoro, vizitis Pekinon inter la 17-a kaj 23-a de majo kaj diskutis kun koncernaj departementoj de Ĉinio pri praktikaj problemoj de la 71-a Universala Kongreso de Esperanto okazonta en Pekino, 1986.

Dum ilia restado en Pekino vicministro pri kulturo Lju Ĝiŝjan, direktoro de la Ĝenerala Administracio de Civila Aviado de Ĉinio Ŝen Tu, vicurbestro de Pekino Baj Ĝjefu kaj vicdirektoro de la Ĉina Internacia



S-ro Ŝen Tu kaj S-ro Y. Umeda





S-ro Ĉu Tunan kaj  
la gastoj en bankedo



Elekto de salono por la 71-a UK





Turisma Servo Ŭang Erkang respektive interparolis kun ili, esprimante varman bonvenon pro ilia vizito kaj aktivan subtenon al la 71-a UK okazigota en Pekino.

Ankaŭ s-ro Ĉu Tunan, membro de la Konstanta Komitato de la Ĉina Popola Kongreso, prezidanto de "Amikoj de Esperanto" kaj honora prezidanto de la Pekina Esperanto-Asocio, kaj s-ro Ĉen Ĵuan, vicprezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, respektive intervidiĝis kun la reprezentantoj de UEA, interŝanĝis kun ili opiniojn pri la 71-a UK kaj invitis ilin al bankedo.

S-ro Ĝang Ĉjiĉeng, ĝenerala sekretario de ĈEL, kaj koncernatoj havis interparolojn kun s-ro Y. Umeda kaj s-ro S. Milojeviĉ pri


praktikaj detaloj de la 71-a UK.

Profitante ilian viziton, la redakcio de EPC, la Internacia Librokomerca Kompanio de Ĉinio, Radio Pekino kaj la Pekina Esperanto-Asocio kunsidis kun la gastoj, kiuj laŭdis la laborojn de ĉinaj samideanoj kaj sincere donis siajn konsilojn.

S-ro Y. Umeda kaj s-ro S. Milojeviĉ estis kortuŝitaj kaj inspiritaj de la forta subteno de la ĉina registaro kaj koncernaj departementoj al la 71-a UK kaj tre kontentiĝis pri sia vizito. S-ro S. Milojeviĉ diris, ke la rezultoj atingitaj dum la vizito estas pli multaj ol kiom UEA atendis. Li estis konvinkita, ke la 71-a UK okazonta en Pekino certe sukcesos kun la granda subteno de la ĉina registaro.

S-ro S. Milojeviĉ  
sur la Granda Muro


Reprezentantoj de UEA kaj respondeculo de ĈEL diskutis pri praktikaj problemoj de la 71-a UK.



La gastoj kaj laborantoj  
de la redakcio de EPC



Sur strato de Pekino







# Belfiguriga Gimnastiko

de LI ĜAJING

**Ĉ**IUTAGA farado de belfiguriga gimnastiko povas ne nur altigi la fortunon, persistemon, lertecon kaj elastecon de la praktikanto, sed ankaŭ beligi lian figuron.

1. Stari dorse al pordo aŭ muro kun la okcipito, skapolaj partoj, kokso kaj kalkanoj tuŝantaj la pordon aŭ muron. Poste en tiu pozo iri tri minutojn en ĉambro malgrandpaŝe. (Bildo 1)

2. Stari sur la piedoj disigitaj de la larĝeco de la ŝultroj, levi la manojn ĝis la ŝultroj kun la manplatoj antaŭen kaj la kubutoj streĉe premataj al korpotrunko, klini la supran korpon antaŭen, rektigi la dorson kaj movi la kapon malantaŭen, teni la pozon 4-6 sekundojn kaj repreni la staran pozon kun la manoj ambaŭflanke de la korpo, malstreĉi la


tutan korpon. Ripeti la movojn ĉ. dek fojojn. (Bildo 2)

3. Kuŝi surdorse, levi la brakojn kaj rekte etendi ilin. Rekte etendi la gambojn kun piedpintoj streĉitaj supren kaj alterne svingi ilin supren kaj malsupren je 20-centimetra movskalo ĝis plena laĉiĝo. Repreni la komencan pozon kaj iom ripozi, poste ripeti la movon 3-4-foje. (Bildo 3)

4. Kuŝi ventre, rekte etendi la brakojn ambaŭflanke tuj de la

korpotrunko, fleksi la genuojn kaj levi la kapon kaj ŝultrojn je 4-6 sekundoj. Repreni la komencan pozon kaj iom ripozi, poste ripeti la movojn 8-foje. (Bildo 4)

5. Ventre kuŝi, horizontale etendi la brakojn ambaŭflanken. Poste levi la kapon kaj brakojn kun rigardo malsupren je 4-6 sekundoj. Repreni la komencan pozon kaj sin malstreĉi, poste ripeti la movojn je 8 fojoj. (Bildo 5)



# Sincera kunlaboro

## — Pri reĝisoro Ĝaŭ Hŭanĝang kaj kamparano-verkisto

**L**A rakonta filmo “Niŭ Bajsuj” reĝisorita de Ĝaŭ Hŭanĝang ricevis la unuan premion de la ĉina eminenta rakonta filmo en la lasta tagdeko de aprilo, ĉi-jare.

Ankaŭ la rakonta filmo “Familio Plena de Ĝojo”, kiun raportis nia revuo en la n-ro 11 de 1981, estis reĝisorita de Ĝaŭ. En la scenara polurado de “Familio Plena de Ĝojo”, li senegoisme

kaj fervore helpis ĝian aŭtoron, kamparano-verkiston Ŝin Ŝjanling. La kortuŝa okazintaĵo fare de Ĝaŭ cirkulas tra Ĉinio jam de longe.

Nun inter filmo-amantoj cirkulas alia rakonto pri li, kvankam ĝi ne havas anekdotan koloron.

Iun tagon de junio 1982, kamparano de Ĵongĉeng-gubernio en Ŝandong-duoninsulo ricevis

*Ĝaŭ Hŭanĝang kaj kamparano-verkisto Ĵuan Ŝjueĉjang*





*La filmada grupo de  
"Niŭ Bajsuj" en an-  
taŭurbo de Pekino*



leteron de reĝisoro Ĝaŭ Hŭanĝang kaj redaktoro de la Ŝanhaja Studio. En la letero ili diris: "Ĉu vi timas kritikon? Se ne, ĉu vi povas adapti vian novelon «Paŝoj de Terkulturistoj» al la ekrano?"

La novelo priskribas Ŝandong-an agrikulturan produktan grupon, kiu sub la gvido de kamparano Niŭ Bajsuj venkis diversajn malfacilojn kaj disvolvis produkton.

La kamparano-verkisto estas 36-jara Jŭan Ŝjueĉjang. En la lastaj 20 jaroj, li laboris kiel komunumano, grupestro de forsto-kulturo kaj vilaĝa instruisto. Li vivas en kamparo, amas literaturon kaj havas riĉajn materialojn pri la kampara vivo. En 1975 iu verkisto, kiu venis al lia vilaĝo por observi la vivon de kamparanoj, proponis, ke li verku ion pri la kamparana vivo. De tiam li suriris verkistan vojon. En la lastaj jaroj li verkis naŭ novelojn kaj publikigis ilin en literaturaj periodaĵoj kaj pro tio vekis atenton en la socio.

En oktobro 1982, Jŭan Ŝjueĉjang venis al la Ŝanhaja Studio. Antaŭ lia forlaso la vilaĝanoj diris al li: "Iru trankvile, ni plenumos vian agrikulturan laboron!" Varmaj larmoj falis laŭ la vangoj de tiu modesta kamparano.

Li kaj Ĝaŭ Hŭanĝang rapide fariĝis bonaj amikoj.

Ankaŭ la 54-jara Ĝaŭ Hŭanĝang estas ŝandong-ano. Post diplomitiĝo el supera mezlernejo,

li estis envolvita de tajdo de vivo en artistan vicaron. En 1952 li diplomitiĝis el la arta fakultato de la Ŝandong-a Universitato kaj eniris en la Ŝanhajan Studion. En la komenco li laboris kiel sekretario de scenoj, poste estis promociita al asista reĝisoro kaj pli poste al reĝisoro. Sur filmofara vojo li senĉese klopodas por trovi pli bonan formon ŝatatan de la spektantoj en filmado pri kampara vivo. La rakonta filmo "Familio Plena de Ĝojo" ĝuste estis frukto de lia senlaca laboro. Sed li ne haltis pro la internacia reputacio alportita de la filmo kaj metis sian atenton sur la postan filmon. Kiam li legis la novelon "Paŝoj de Terkulturistoj" de Jŭan Ŝjueĉjang, li estis tuj kaptita de viglaj personoj kaj fortaj etosoj. Li decidis refoje kunlabori kun kamparana verkisto.

Dum adaptado de la novelo al la ekrano, Ĝaŭ Hŭanĝang prezentis tri observendajn regulojn: Unue, la adaptanto kaj reĝisoro devas eldiri ĉiu sian opinion senrezerve kaj respekti unu la alian; due, ambaŭ ne devas kaŝi sian bonan ideon aŭ filman intrigon; trie, se la adaptanto trovis, ke ideo de la reĝisoro pri la filmo kontraŭas al reala vivo, tion li devas tuj montri.

En polurado de la scenaro ili ofte forgesis dormi kaj manĝi kaj eĉ laciĝis ofte pro unu detalaĵo. Post sep-foja polurado la scenaro estis fiksita en printempo 1983. Dank' al la helpado de Ĝaŭ Hŭanĝang, en la scenaro estis konservita

*Reĝisoro Ĝaŭ Hŭanĝang interparolas kun fama aktorino Gong Ŝjue.*



la stilo kaj trajto de la originalo kaj plialtigita ĝia arta esprimo.

Estas menciinde, kiam Ĝaŭ Hŭanĝang estis helpanta Ĵuan Ŝjueĉjang, li fervore helpis ŝoforon en polurado de scenaro de filma scenaro "Agrabla Vojaĝo". Post 6-7-foja polurado, li persone sendis ĝin al redakcio de filma gazeto por ĝin publikigi.

Dank' al fervora helpo de Ĝaŭ Hŭanĝang, tiuj amatoraj verkistoj akiris sukceson en unuafoja provado de scenaro. Ili diris, ke multaj enhavoj de la scenaro estas poste pliigitaj. Por danki Ĝaŭ Hŭanĝang en lia fervora helpo, Ŝin Ŝjanling kaj Ĵuan Ŝjueĉjang plurfoje petis aperigi la nomon de Ĝaŭ Hŭanĝang en la scenaro kiel unu el ĝiaj aŭtoroj, sed tio estis rifuzita de Ĝaŭ. Li diris: "Helpi amatoran verkiston en polurado de scenaro estas devo de ni reĝisoroj."


En junio 1983, fondiĝis la filmada grupo de "Niŭ Bajsuj". Ĝaŭ Hŭanĝang petis Ĵuan Ŝjueĉjang labori kiel ĝia arta konsilanto.

Antaŭvespere de la Printempa Festo de 1984, kiam la filmo "Niŭ Bajsuj" estis unuafoje projekciita en Ŝandong-provinco, pli ol 4 000 komunumanoj bicikle kaj traktore alrapidis por ĝin rigardi de najbaraj gubernioj kaj urboj malgraŭ la frostoj. La filmo akiris grandan sukceson. Kampanoj svarme ĉirkaŭis Ĝaŭ Hŭanĝang kaj diris: "Li estas reĝistoro de ni terkulturistoj."

En tutlanda kunveno por premii eminentajn filmojn, denove renkontiĝis Ĝaŭ Hŭanĝang kun sia sincera amiko Ĵuan Ŝjueĉjang.

Ĵuan Ŝjueĉjang emocie diris al mi: "Mi bone konatiĝis kun bona reĝisoro. Antaŭe mi opiniis, ke eniri en filmistan rondon postulis tro altan edukitecon pri arto kaj filma teorio. Ĝaŭ Hŭanĝang forigis mian skrupulon kaj gvidis min antaŭen . . ."

Kiam mi demandis Ĝaŭ pri lia estonta filmada plano, li montrante Ĵuan Ŝjueĉjang diris: "Ni eble plu kunlaboros. Tio povas esti nur kunlaboro, sed ne helpo unu al alia. Kino ja estas arto de kolektiva kunlaboro. Ni, reĝisoroj, devas altigi la fidon de amatoraj verkistoj, eble la vera arto venas el inter ili."







*S-ro Hu Ĝong-ŭen*

# Retrovita la ora gamo-sonorilaro

de ĈANG ŜIJUN

**E**N la Muzeo de la Imperiestra Palaco estas eksponata la ora gamo-sonorilaro, kiu estis farita en 1790 p. K. kaj allogas ĉiujn vizitantojn per sia koloro kaj delikateco.

Gamo-sonorilaro estis palaca muzikilo en la antikva Ĉinio. Jam antaŭ la dekunua jarcento a. K. aperis gamo-sonorilaro. En la periodo de Militantaj Regnoj (475—221 a. K.) aperis gamo-sonorilaro el 64 pecoj. Kaj en la postaj dinastioj la gamo-sonorilaroj uzataj de la palaco konsistis plejparte el 16 pecoj.

Ĉiuj gamo-sonorilaroj de la dinastioj de Ĉinio estis bronzaĵoj, escepte de tiu, kiu estis farita laŭ la ordono de imperiestro Ĉjanlong de Ĉing-dinastio (1644—1911 p. K.) por montri la prosperon kaj potencon de la lando. Por fari tiun gamo-sonorilaron el 16 pecoj oni uzis eĉ 357.14 kilogramojn da oro. Ĉiu sonorilo surhavas tonnomon en la mezo ĉirkaŭitan de du reliefaj drakoj, kiuj dancas inter ŝvebantaj nuboj kaj ondiĝanta maro. La gamo havas dek du regulajn tonojn kaj kvar basajn tonojn. Tiuj sonoriloj kun delikateco kaj eleganteco laŭvice pendas sur unu ligna framo ore lakita. Laŭ la difinoj de Ĉing-dinastio la palacaj muzikiloj devis esti lokitaj sub la teg-

mento de Tajhe-halo kaj la portalo de Tajhe-pordego okaze de gravaj ceremonioj. Oni ludis tiujn instrumentojn en gravaj festoj kaj bankedoj, kiel la Printempa Festo, vintra solstico, naskiĝtago kaj nupto de imperiestro k. a. Kiam imperiestro ascendis kaj descendis la tronon kaj akceptis surgenue salutantajn korteganojn, oni ludis ankaŭ la muzikilojn.

Kiu scias, ke la valorega ora gamo-sonorilaro travivis malfeliĉan tempon kaj preskaŭ trafis fandadon en la malnova Ĉinio?

La Revolucio de 1911 renversis Ĉing-dinastion, la lastan feŭdan dinastion de Ĉinio, kaj la tiama registaro permesis al la lasta

imperiestro Puĵi kaj liaj familiaĵoj loĝi daŭre en la palaco kaj vivtenis ilin per kvar milionoj da taeloj da arĝento ĉiujare. Sed la sumo ne povis kovri la elspezon de ilia diboĉa vivo. Ili siaflanke ŝtele hipotekis valoraĵojn konservitajn en la palaco por sin vivteni. En 1924 la ora gamo-sonorilaro estis hipotekita al la Pekina Salindustria Banko kontraŭ 400 000 taeloj da arĝento. Post nelonge la afero malkaŝiĝis. La militaristoj kaj la tiama registaro ĉiuj intencis proprigi ĝin al si. Ili ĉie serĉis ĝin. Respondeculo de la banko decideme neis pri la hipotekeco kaj sendis ŝtele forporti ĝin al la Tjanĝin-a filio de la Salindustria Banko.

*Oni rigardas la muzikilojn*





*La ora gamo-sonorilaro*

Post kiam la japanaj agresantoj okupis nordan Ĉinion en 1937, japanaj spionoj baldaŭ ricevis la informon, ke la ora gamo-sonorilaro estas en Tjanĝin. La japana vickonsulo en Tjanĝin tuj venigis Ĉen Jihou, direktoron de la Tjanĝin-a Filio de la Salindustria Banko, kaj minacis kaj devigis lin doni la valoraĵon. Ĉen bone sciis ke li jam ne povas sekure konservi ĝin ĉe si. Li do sendis al la ĉefdirektoro, kiu tiam ne estis en Tjanĝin, por peti lian instrukcion. La ĉefdirektoro sendis telegramon al li kun nur unu vorto: "Detruu". Tio signifis fandi la oran gamo-sonorilaron en orbrikojn. Ĉen longe pripensis kaj ne povis submetiĝi al la kruela decido ĝin detruu per fando. Li do turnis sin al sia intima amiko Hu Gong-ŭen por peti lian konsilon. S-ro Hu estis patrioto. Riskante sian vivon, li

transportis la gamo-sonorilaron per aŭtomobilo el la banko kaj kaŝis ĝin en subteran konservejon, malgrandan kaj neokulfrapan. La sekvintan tagon li aĉetis kelkajn tunojn da karbo kaj per ili kovris la pordon de la konservejo.

Vidinte, ke Ĉen Jihou neniel volas doni la oran gamo-sonorilaron, la japanaj spionoj traserĉis la salindustrian bankon kune kun multaj soldatoj, sed vane.

Post la venko de la Kontraŭ-japana Rezistmilito ankaŭ la kuomintanga registaro sendis spionojn ĉie demandi pri la ora gamo-sonorilaro, sed s-ro Hu ne donis ĝin. Oni opiniis tiam, ke ĝi jam forfandiĝis kaj malaperis por ĉiam.

La trian tagon post la liberiĝo de Tjanĝin en 1949 s-ro Hu, en

la nomo de la salindustria banko, donis la oran gamo-sonorilaron al la popola registaro, kaj ekde tiam la nacia trezoro revenis en la manojn de la popolo kaj radias siajn orajn brilojn por eterne.





**M**I vizitis Tjantong antaŭ 30 jaroj, kiam mi lernis en elementa lernejo de la havenurbo Ningbo en la orienta parto de Ĝeĝjang-provinco. Tjantong situas en montaro sudoriente de la urbo Ningbo je 30 kilometroj kaj estas fama pro sia antikva templo. Iuprintempe nia lernejo faris ekskurson al la antaŭurbo. Ni frumatene ekveturis per ligna boato kaj poste pene surgrimpis la montetojn. Kiam ni atingis la celon, jam komenciĝis vespera krepusko kaj ni ĉiuj forte laciĝis. Tial tiu ekskurso restigis preskaŭ nenion en mia memoro.

Frusomere ĉi-jare, mi havis ŝancon reviziti Tjantong. Hodiaŭ, post nur unuhora aŭtoveturado oni povas atingi la lokon. Pro la oportuna trafiko nun ĉiutage aro post aro da pilgrimantoj kaj vizitantoj tien rapidas por ĝui ĝian belan pejzaĝon.

Por atingi Tjantong oni devas trapasi montgorĝon. Tra la aŭta fenestro mi vidis la pli-ol-30-metran Pagodon "Jada Budho", okangulan kaj sepetaĝan ĉe la sudo de la montaj krutaĵoj.

Nemalproksime de la monteto post la pagodo, staras la unua pordo de Tjantong-templo, unu kilometron for de la antikva templo. Mi elaŭtiĝis kune kun aliaj vizitantoj kaj paŝis antaŭen. Interne de la pordo, estas sabla milde leviĝanta montvojeteto kun altaj antikvaj pinoj ambaŭflanke, iuj el ili aĝas jam pli ol 300 jarojn kaj havas trunkon nebrakumeblan por unu persono. Ĝuste pro tio la loko havas la nomon Dekmil-pina Pasejo. Pli antaŭe kreskas verdaj bambuaroj, ĉiu kun kelkcent bambuoj. Ili ĉiuj estas ombroriĉaj kaj dikaj je ĉ. 10 centimetroj. Tie mi sentis min kvazaŭ purigita de la naturo.

## VIDINDAJ LOKOJ

# Revizito al Tjantong


de ŜJŬE ŜENG

Trans la bambuaroj, kuŝas la granda fiŝbaseno. Sur la ekranmuro antaŭ la baseno estas gravuritaj kvar grandaj ĉinaj ideografiaĵoj kun signifo "Sudorienta Budha Regno". Jen ni atingis Tjantong-templon.

La templo havas historion de pli ol 1 600 jaroj. La koncernaj dokumentoj diras, ke antaŭ longe bonzo Jiŝing venis tien en sia migrado.

Pro amo al la tiea pejzaĝo, li konstruis kabanon por sia fiksloĝo, sin kulturis laŭ religio kaj recitis sutrojn tage kaj nokte. Post longa tempo, la Ĉiela Imperiestro estis kortuŝita de lia sincereco kaj ordonis la Oran Stelon Tajbaj transformiĝi en infanon kaj descendi en la mondon por lin servi. Ĝuste pro tio la templo ricevis la nomon (Tjantong signifas ĉielan knabon en la ĉina lingvo — La Trad.) kaj la ĉirkaŭa montaro la nomon Tajbaj-montaro.

*La pagodo "Jada Budho"*



En pli ol 1 000 jaroj de post ĝia naskiĝo inundo kaj brulego ofte atakis Tjantong-templon, kiu estis sepfoje ruinigita kaj rekonstruita. La nuna templo estis rekonstruita post 1631. De la Ĉielreĝa Halo ĝis la Arhata Halo kvar grandaj haloj staras sur la montodeklivo kaj formas akson de la konstruaĵoj. La koridoroj kaj akcesoraj ĉambroj simetrie staras ambaŭflanke de la grandaj haloj. La templo kun pli ol 900 ĉambroj estas impona kaj grandioza. En la haloj la budhostatuo solene mienas kaj bonodora fumo spiralas el la incensuoj. La bonzoj frapas vespere tamburon kaj sonorigas matene sonorilon, recitas sutrojn kaj kultas la budhojn.

Tjantong-templo estas ĉirkaŭita de 300 hektaroj da arbaro, kie kreskas ĉ. 600 specoj de subtropikaj arbustoj kaj arboj. De la las-

taj jaroj dank' al la subteno de forstokulturaj departementoj, la laboristoj de la Tjantong-a Forstokultivejo konstruas arbaran pitoreskejon. Ili konstruis hotelojn kaj restoraciojn kun suprenlevitaj tegmentrandoj por la turistoj. Estas jam bone riparita la proksima pitoreskejo, kie la montodeklivoj abruptaj, la montpintoj kuriozaj kaj la kavernaro aspektas kiel abelujoj. Jen la plej ĉarma loko en la dek grandaj pitoreskejoj de la templo.


Transpasinte la nove konstruitan longan koridoron, mi supreniris al la montsupro laŭ la ŝtupoj ankaŭ nove konstruitaj. Ambaŭflanke de la vojo verdis densaj arboj, murmuris fontoj kaj el la arbaro de tempo al tempo aŭdiĝis birdkantoj. Kiam mi atingis la montpinton, kiu ĝenerale ebligas okulplaĉan birdvidon al la tuta Tjantong, tamen

la ĉielo kvazaŭ konspiris kontraŭ ni kaj ekfalis pluveto. Je momento leviĝis nebulo, kaj la loko fariĝis kvazaŭ izolita insulo en nubomaro. Feliĉe, mi ĝuis ankaŭ la poezian pejzaĝon.

La arbara ĝardeno bezonas pluapaŝan konstruadon. Laŭ la plano de la forstokultivejo la ŝoseo atingos la montosupron, kiu faciligos la birdvidon al la panoramo de Tjantong. Ĉe ambaŭ flankoj de la Dekmil-pina Pasejo estos konstruita botanika ĝardeno kun pli ol 600 specoj de arbustoj kaj arboj, kio kaj liveros esplorejon al la sciencistoj kaj donos botanikajn sciojn al la vizitantoj. Oni malfermos ankaŭ kampadejon por la junaj turistoj.

Je adiaŭo mi diris al la mastro de la forstokultivejo, ke kiam la plano efektiviĝos, mi revizitos Tjantong, se eble.

## LOKOJ MENCIIITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Ĉinghaj-provinco
2. Ŝandong-provinco
3. Lanĝoŭ
4. Jinĉŭan
5. Uhan
6. Ningbo
7. Nankino
8. Suĝoŭ
9. Ŝanhajo
10. Hangĝoŭ
11. Nanĉang
12. Ĉangŝa
13. Ĉangĉun
14. Kantono
15. Ĝjangsu-provinco





# Tjantong

Fotoj de CAJ HAJFENG

Pagodo en la templo

La antikva templo en arbaro






Arbaro en nebulo




Budhismo servo en



Vojeto al pinaro



la templo



# FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ

de J. GORDON-TILL (Britio)



Berlino de la Germana Demokrata Respubliko

Germanaj geesp-istoj en la Bavaraj Alpoj







LIŬ SJANPING:

## Gasti en hejmloko de grandaj pandoj

(Daŭrigo)

**K**UN la deziro pli frue vidi Ĝenĝen, ni fariĝis pli energiaj kaj rapide iris al ĝia nesto en Erdaŭping.

Sur la muskoplana marĉo troviĝis malordaj piedsignoj de bestoj. La vojo estis pli malfacila por la piedirantoj, kiuj devis iam transpasi falintajn arbojn. Larĝfoliaj arboj fariĝis pli kaj pli malmultaj. Vidiĝis nur dikaj cugoj (*Tsuga chinensis*) kaj abioj. La monotonan medion vigligis flame ruĝaj folioj de nekonataj arbustoj kaj gajigis hazardaj kantoj de birdoj.

Pro la loko tro alte situanta super la marnivelo, mi anhelis kaj ankaŭ la ĉemizo tramalsekiĝis de ŝvito. Post la kruta de-

klivo antaŭ ni aperis milda deklivo. Profesoro Hu haltis kaj sin turnis al ni, gestante ke ni estu silentaj kaj singardemaj.

Tang kaj mi tuj streĉiĝis nerve. Ni silentiĝis kaj per la okuloj traŝerĉis ĉion eksterordinaran ĉirkaŭe. En la rezervejo ĉasado estas malpermesata, tial plimultiĝis ankaŭ la brunaj ursoj, leopardoj kaj aliaj rabobestoj.

Ni ne sciis, de kiam ĉesis la vento, kaj en la profunda arbaro regis miriga kvieto. Subite aŭdiĝis hastaj birdkrioj kaj forflugis super niaj kapoj kvar-kvin ruĝbekaj birdoj. Spertoj konigis nin, ke eble aktivadas ĉirkaŭe grandaj bestoj.

Aplombe promenis profesoro

Hu tien kaj reen kun la peza tornistro surdorse, dume liaj akraj okuloj sagace direktiĝadis al la densaj bambuaroj.

Evidente ni devis denove grimpi montodeklivon kaj oranĝflava tendo elvidiĝis de maldekstre de arbaro. Ĝi tuj aperis antaŭ ni. Profesoro Hu demetis sian tornistran, kvazaŭ reveninte hejmen, kaj diris:

“Jen la observ-punkto Erdaŭping.”

Tute ekster la atendo, ni jam atingis la cellokon, tiam estis iom post la unua ptm. Nerimarkite, ni jam iradis en montoj pli ol ses horojn.

“Rigardu tien,” profesoro Hu montris suden de nia irita vojo,

dirante, “pli profunden. Jes, ĝuste sub la granda abio estas nesto de Ĝenĝen.”

Ja ne estis senkaŭze, ke li postulis, ke ni estu silentaj kaj singardemaj, tuj kiam ni surpaŝis la ebenejon inter montoj. La loko estis Erdaŭping, nutroĉambro de la granda pando, tial tie estis necese malpermesi ajnan bruon. Kun ĝojo ni rigardis al la granda abio, ni ne bezonis binoklon por rigardi objektojn 50-60 metrojn malproksimajn. Tie la pinglofoliaj arboj ĉiuj estis altaj kaj la trunkoj dikaj, ekz. la apuda arbo ja estis ĉirkaŭprenebla de mi kaj Tang per ambaŭ etenditaj brakoj, tamen ili ne malhelpis nian vidon. Sed la nesto estis nevidebla, eĉ binoklo ne efikis, ĉirkaŭe estis densaj bambuaroj.

Profesoro Hu prenis el la tendo radio-spurilon kaj almetis la aŭdilon al siaj oreloj, tenante la moveblan antenon enmane.

“Kiel statas la aferoj?” mi demandis.

Mi ne sciis, ĉu li ne aŭdis miajn vortojn aŭ ne havis tempon por respondi, li okupiĝis nur pri kaptado de la frekvenco kaj senhalte notis ion en sia notlibro. Fine li donis la aŭdilon al mi:

“Jen la informo de Longlong.”

La rapida sono “ta, ta. . .” frapas miajn orelojn kaj li ŝanĝis frekvencon.

“Jen la informo de Ningning.”

La sono tuj ŝanĝis sian ritmon kaj fariĝis malrapida kaj longa. Ili ambaŭ estis junaj grandaj pandoj kaptitaj ĉi-printempe.

“Jen vi aŭdos la informon de Ĝenĝen.”

Ankaŭ ĝia informo estis tiel longa.

“Vin trafis misfortuno,” kun bedaŭro li disetendis siajn manojn, dirante: “Ĝi ne volas akcepti vin.”

Li certe rimarkis bedaŭron kaj dubon en niaj larĝe malfermitaj okuloj.

“Laŭ la informoj nun aktivadas nur Longlong, dum Ningning ripozas kaj Ĝenĝen dormas kun la bebo en sia sino.”

“Se ĝi serĉas manĝaĵojn ekster la nesto, ni ja povas ĝin hazarde renkonti. Sed nun ĝi dormas, ĉu tio ne estas la plej bona ŝanco por ĝin vidi?” haste demandis Tang.

Mi volis ion diri, sed fine la vortoj haltis ĉe la pinto de la lango, ĉar en mia memoro ankoraŭ freŝe restis la akcidento trafita de profesoro Hu.

Komence de septembro la informo de spurado konstatis ke Ĝenĝen jam havis idon. La informo ege maltrankviligis ĉiujn. Ĉiu el ili volis tien rapidi, sed neniu kuraĝis riski.

Spurado en oktobro plie konstatis, ke Ĝenĝen estis en mamnutrado, aktivadis pli longe ol antaŭ septembro; evidente ĝi bezonis akiri pli da nutraĵo por lakto. Kun la tempopaso oni pli deziris persone rigardi ĝin kaj ĝian bebon, kompreneble kun ia risko.

Tiel deziris ankaŭ profesoro Hu. Sed kiel zoologo, li klare sciis la fortan patrinecon de mamulino. Dum siaj nasko kaj mamnutrado la besto estas tre sentema, ekstreme saĝa, maltima kaj eksplodema. Por protekti siajn idojn ĝi povas senhezite oferi sian vivon. Kaj en alia eksterordinara okazo iuj bestoj povas forlasi siajn idojn. En zoo oni plurfoje vidis, ke la surprizitaj

tigro kaj leopardo forlasis siajn idojn, la similaj okazoj estis ankaŭ ĉe bredataj grandaj pandoj.

Estis ja nekredeble, ke la kelkcent-kilograma matura granda pando estas ĉe la naskiĝo nur 80-90-grama kaj 13-14 centimetrojn longa kun fermitaj okuloj kaj blankaj haroj sur la karnoruĝa korpo. La novnaskita pando tute similis al kobajo, absolute sen nigraj atlas-similaj strioj. Ili nigriĝis ĉe la skapolo, okulĉirkaŭo kaj kvar membroj nur unu monaton post naskiĝo kaj elkreskis klare distingeblaj nigrablankaj strioj. Nur tiam ili havis formon de granda pando kaj pezon de kilogramo. La novnaskitaj pandoj estis tre delikataj. Ili senĉese plorkriis kaj iam eĉ kriis pli ol 120 fojojn en unu horo, postulante lakton kaj karesadon de la patrino. Ankaŭ la patrino tre dorlotis sian novnaskitan idon. Ĝi delikate tenis la idon per la buŝo aŭ en la sino.

Pri kio pensis tiam profesoro Hu?

Estos ja timiga atako de Ĝenĝen. En alia rezervejo por protekti sian idon iu pandino demordis manon de iu viro, kiun mi propraokule vidis.

Tamen tio estis malpli damaĝa ol ĝia ebla forlaso de la ido. La observ-centro ja neniel povis toleri tian damaĝon.

Ripetade diskutinte kaj alpreninte necesajn rimedojn, profesoro Hu kaj doktoro Shirer decidis viziti la pandinon kaj ĝian idon.

La 20-an de oktobro, ili atingis la observ-punkton ĉe Erdaŭping. Ili tuj eltendiĝis kaj prenis vojon iritan de la besto, kiam la radio informis, ke Ĝenĝen elnestiĝis por serĉi manĝaĵon. Singardeme iris profesoro Hu en la fronto kaj doktoro Shirer malantaŭ li. Ĉu





ili volis viziti la novnaskiton, profitante la okazon, kiam forestis ĝia patrino, aŭ unue trovi, kie estis la pandino kaj poste, ĝin evitante, viziti ĝian neston?

Malgraŭ la detala aranĝo, malgraŭ ĉu ili volis aŭ ne, la fakto fariĝis tiel, ke la pandino kun kolĉeno subite aperis antaŭ ili. Ili ambaŭ estis mirigitaj. Tamen la aplomba profesoro tuj rimarkis, ke la besto ne vidis ilin. Ĝuste kiam ili cerbumis kiel ĝin eviti, la besto iris rekte al ili. La distanco estis tro mallonga kaj fuĝi estis neeble. Profesoro Hu levis kodakon kaj haste fotis la scenon. . . Ah, la besto subite indigne sin ĵetis al la profesoro kaj doktoro, en distanco de nur unu metro. . .

En tiu kriza momento la altastatura profesoro baris al ĝi la vojon kaj sin turnis, kuris supren al deklivo. Ĝenĝen ne volis lin forlasi kaj tuj postkuris lin. Pando povas rapide kuri en bambuaro kiel fiŝo en akvo. Ĝenĝen kvazaŭ potenca buldozo kuris disflankigante bambuaron, dume por profesoro Hu la bambuaroj fariĝis danĝera obstaklo. Li sal-

tante kuris al la montsupro per sia tuta forto, kaj precipe al kruta deklivo. Ĉu pro la sagaco kaj fortikeco de la profesoro aŭ pro mallerteco de la granda pando en la grimrado de kruta deklivo, fine la besto haltis en anhelo. Tiam haltis ankaŭ la profesoro. Li sin turnis kaj fikse rigardis ĝin ankaŭ anhelante.

La profesoro ĵetis rigardon al la vastaĵo.

Post momento, Ĝenĝen unue sin returnis, fulmrapide malsuprenkuris laŭ la irita vojo.

Profesoro Hu komprenis, kion Ĝenĝen volis. Li tuj sin pafis malsupren de la monto.

La besto ekbolis de kolerego kaj ree sin turnis kaj denove ĵetiĝis al la profesoro. Hu tuj sin turninte kuregis supren. La sceno ripetigiĝis same kiel antaŭe. Ĝenĝen forte anhelis, levante siajn flamajn okulojn al la anhelanta profesoro sur la monto.

La profesoro refoje rigardis la vastan kampon kaj la gigantan abion.

Ĝenĝen refoje malsupreniris de la monto laŭ la malnova vojo, dume la profesoro tuj sin ĵetis malsupren, tamen ne laŭ la malnova vojo.

Tiam de la abio aŭdiĝis bleko simila al tiu de hundo aŭ kapro.

Stumblis la granda pando. Ĝi sin turnis kaj kuris al sia nesto ĉe la abio nur kiam ĝi certiĝis, ke la profesoro direktis sin alflanken.

Nun pri doktoro Shirer. Ĝuste en la momento, kiam la pando sin ĵetis al ili, li surarbiĝis, eble forgesinte, ke pando povas lerte surgrimpi arbon.

Poste, multaj, inkluzive de mi, plurfoje demandis profesoron Hu, ĉu li forkondukis la beston por ŝirmi la doktoron. Pri tio li kategorie neis: "Mi ja terurigiĝis. Ĉar ĝi postkuris min, mi certe devis forkuri. Mi estas forta kaj longe vivas en la sovaĝejo. Mi konas ĝian temperamenton, tial ĝi ne kuratingis min."

Neniu kredis lian respondon, sed kompreneble plue demandi estis senrezulte.

Mi ne propraokule vidis la grandan pandon, nek ĝian bebon, tamen mi estis kontenta. Eble ankaŭ Tang estis tia.

Haltante, ni sentis malvarmon. La ĉemizoj tramalsekigitaj de ŝvito nin kvazaŭ glaciigis. Malgraŭ tio ni sidigis en la tendo kaj prenis manĝaĵon — ankaŭ la malsatego estis suferiga. Malgranda sciuro desaltis de arbo kaj, movante siajn okulojn, similajn al nigraj faboj, petis de ni manĝaĵon. Akirinte peceton da biskvito, ĝi tuj forkuris, kaj post momento ree venis. Ĉu ĝi portis la manĝaĵon al siaj idoj aŭ metis en sian konservejon? Ĝi iam eĉ saltis sur la manon de la profesoro por kapti lian manĝaĵon. Mi kaj Tang plurfoje provis tiel ĝin logi, sed malsukcesis. La profesoro diris:

“Ni estas malnovaj amikoj. Se vi frekventos ĉi tien, ĝi certe intimiĝos kun vi!” Tiel li konsolis nin, kaj samtempe esprimis sian bedaŭron pri nia baldaŭa disiĝo. Li tre alte taksas amikecon.

Subite la profesoro ekscitiĝis!

Aŭdiĝis bleko simila al hundi-da bojo.

“Tio estas bleko de la novnas-kita pando.”

Jes, la krio ĝuste venis de la granda abio.


“Ĝi petas vian pardonon, ke hodiaŭ ĝi ne povas vin akcepti.”

Super la monto eksonis nia gaja rido.

*(Fino)*



## En 1986 vin bonvenigos la kongresa urbo



# Pitoreska Pekino

La libreto, kun mapo, pentraĵoj kaj koloraj fotoj, konigas al vi pli ol dudek vidindejojn.

Eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo

Formato: 132×186mm. 74 pĝ. broŝ.

Prezo: £0,95 US\$ 2,00

Numero: 17-Es-1827P

Mendu ĉe: Libroservo de UEA

Perantoj de EPC

aŭ Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio  
(GUOJI SHUDIAN), Esperanta Sekcio,  
P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio



# Ĉiam strebi antaŭen

de ĜANG ĈUNŜJANG

*Ŝi estas ordinara laborulo kaj fortulo inter la virinoj. Banaleco verŝajne ŝin ne konas. En la vivo ŝi ĉiam strebas antaŭen.*

— La Red.

Iuj ofte nomas la virinon malforta sekso, sed sennombraj faktoj pruvis, ke tio estas antaŭjuĝo. Mi, denaske firma, malkonsentis tiun konkludon.

En 1970, post kiam mi diplomitiĝis en gimnazio, mi estis sendita al iu pogranda vendejo de metalaĵoj en la urbo Ĉanĝĉun. Oni ne devas subtaksi la mallongan vendotablon. Se vi staras tie vizaĝe al pli ol 2 000 specoj da varoj, eble konfuziĝas via vido. Kaj eble okazas ridindaĵoj, se vi ne konas la kromnomojn de la varoj donitajn de la popolanoj. Ekzemple, la kromnomo de ia robotilo estas “duoble faldita palpebro”, kiun mi ne sciis. Iutage venis kliento. Li kun rideto diris al mi, ke li deziris “duoble falditan palpebron”. Mi miskomprenis, ke li ŝercis pri mi. Mi do riproĉis lin. Li embarasiĝis kaj ne sciis kion fari. Feliĉe, veterana vendisto malembarasigis nin. Ia ŝlosilo havas la nomon “okula ŝraŭb-ŝlosilo” aŭ “buŝferma ŝraŭb-ŝlosilo”, ankaŭ kiujn mi ne konis. Mia nescio plurfoje ellasis klientojn el nia vendejo, kvankam troviĝis ĉe ni tiaj varoj.

Praktiko konigis al mi, ke sen fakaj scioj nur entuziasmo ne sufiĉas en la laboro. Tial, mi pruntis plurajn librojn pri meta-

laĵoj kaj persiste legis ilin matene kaj vespere. Mia edzo estas tre okupita kaj ofte mallonge restas hejme kaj krome mi havas malgrandajn infanojn, tial la tuta hejmlaboro falis sur min. Kiam la infano ne volis frue enlitiĝi mi do legis kun la infano en mia sino. Foje mi kuirante legis, kaj mi eĉ ne rimarkis karbiĝon de rizo. Ĉiumatene je la kvara mi ellitiĝas por lerni la fakajn sciojn. Foje, mi misprenis la unuan horon por la kvara kaj ellitiĝis, tial mia edzo diris, ke mi estis kvazaŭ fascinita de legado.

Post kelkaj jaroj mi jam ĝuste kaj lerte posedis la sciojn de ĉiaj varoj de nia vendejo, krome mi ankaŭ fundamente konis la normojn, specojn kaj uzojn de niaj varoj.

Februaron de 1982 mi partoprenis en la ekzameno okazigita de la komerca branĉo kaj meznombre per 91.5 poentoj en 5 fakoj gajnis la unuan lokon inter pli ol 1 000 junaj laborantoj de la tuta kompanio. Tial en januaro de 1983, mi kaj aliaj 8 junuloj gajnis la titolon “unuaklasa vendisto”.

Servo ĉe la vendotablo ne estas komforta laboro kaj vendo de la metalaĵoj enuiga. Tamen

mi ja ŝatas stari ĉe la vendotablo kaj sentas min ĝoja en servado al klientoj. Nun, kiam klientoj venas por aĉeti la metalajn instrumentojn, mi ĉiam detale konigas al ili la produktaĵojn, uzojn, karakterojn, malmolecon, kemiajn elementojn, protektajn metodojn kaj elektajn normojn de tiuj varoj. Antaŭe, la klientoj ofte dubis pri la kvalito de la vitrotranĉiloj, ĉar ni ne permesis al ili provi, pro tio niaj vitrotranĉiloj havis malgrandan debiton. Por ŝanĝi tian staton mi ellernis vitrotranĉadon, tial mi povas fari demonstradon antaŭ la klientoj, kio bone kontentigas ilin.

En 1980 mi estis nomumita de la kompanio kiel vicdirektoro de la pomalgranda vendejo. En nia vendejo troviĝis 40 laborantoj kaj 80% el ili estis junaj. Por levi iliajn fakajn sciojn mi organizis lernan grupon. Tamen mankis al ni instruisto. Tial oni instigis, ke mi instruu. Mi ĉiam estas kuraĝa kaj volas provi ĉion novan, tial mi senhezite konsentis. Lerninte de aliaj, mi preparis la instruan projekton kun dekmi-loj da ideografiaĵoj. Ĉiumatene, je unu horo antaŭ labortempo, starante ĉe la vendotablo kaj prenante la varojn por instrui



*La aŭtoro (la dua de dekstre)*

materialoj, mi donis la varajn sciojn, mankantajn al la novaj komizoj. Mi lernigis al ili la sciojn pri kalkulo, administrado, respondecoj kaj disciplinoj de la vendistoj. Dank' al la lernado multe leviĝis la kapablo kaj labornivelo de la junaj laborantoj. En la teknikaj konkursoj okazigitaj de la kompanio en 1981 kaj 1982, nia vendejo dufoje gajnis la unuan lokon per la totala poentaro kaj estis elektita kiel avangarda kolektivo de la kompanio.

Kvankam mi estas unu el la respondeculoj de la vendejo, tamen mi daŭre servas ĉe la vendotablo kaj tie plenumas miajn ordinarajn estrajn laborojn. En dekelkaj jaroj, depost kiam mi eklaboris tie, mi neniam petis forpermeson pro malsano aŭ privata afero. Mi opinias, ke oni devas ĉiam strebi antaŭen.

Mi estas patrino de du infanoj, tamen mi estas ĉiam ĝoja malgraŭ la peza laboro kaj bagatela dommastrumado. Mi ŝatas esti inter la knabinoj, kio ŝajne plijunigas min. Kvankam mi ĝoje rilatas kun ili, tamen mi rigore postulas, ke ili nepre bone faru sian laboron. Iu knabino ne volis servi ĉe la vendotablo, ofte laboris kun sulkitaj brovoj kaj iam eĉ kvarelis kun la aĉetantoj. Mi plurfoje admonis ŝin, tamen tio ne efikis. Neatendite okazis jena interesa epizodo: Oni volis svati nekonsentan knabon por ŝi. Por vidi kia ŝi estas, la knabo iutage venis en la vendejon. Tiam ŝi sidis kaj la knabo ne povis scii ŝian kreskon. Tial li pretekste diris: "Montru al mi ĉizilon!" Ŝi ja restis sidanta, respondante: "Ĉu vi ne havas okulojn? Ĉiuj objektoj estas en la vitroŝranko. Rigardu mem!" Aŭdinte tion, la knabo kolere foriris. Li diris al la svatanto:

"Tro pika ŝi estas. Mi ne aŭdacos vivi kun ŝi!" Tiel malsukcesis la svatado, pro tio ŝi tre bedaŭris. Kaptante tian okazon mi kore interparolis kun ŝi, por ke ŝi ŝanĝu sian krudan sintenon al la klientoj. Ŝi akceptis mian proponon kaj de tiam ekamis sian laboron, varme kaj zorgeme servis al la klientoj, fervore helpis ilin solvi malfacilojn kaj estis laŭdata de siaj kolegoj kaj klientoj.

Vivo kiel kalejdoskopo riĉkolora. Ĝojo kaj malĝojo ĉiam rajdas samtempe ĉu en laborposteno aŭ en hejmo. Kiam miaj infanoj kaj edzo estas ĉe mi, mi estas tre ĝoja, eĉ se mi faras pli da domlaboroj. Male, kiel supredirite, kiam mia edzo forestas pro laboro, mi kaj la infanoj neeviteble sentas solecon kaj mankon de helpanto. Tiam ni sopiras al li kaj esperas, ke li pli frue hejmveneros.



# Denove Esperantista Vizitgrupo en Ĉinio

**G**VIDATE de brita esperantistino s-ino Nancie Durham, vizitgrupo el samideanoj de Britio, Francio, Nederlando, FR Germanio, Italio, Svisio kaj Danlando vizitis Ĉinion de la 19-a de aprilo ĝis la 10-a de majo. Jen la dua vizitgrupo organizita de s-ino Nancie. La gastoj vojaĝis 4 000 km. tra Ĉinio kaj rigardis vidindajn lokojn en Pekino, Nankino, Suĝoŭ, Ŝanhajo, Hangĝoŭ, Nanĉang, Ĉangŝa kaj Uhan. Tie ili konis la vivon de la ĉina po-

lo kaj renkontiĝis kun ĉ. 500 ĉinaj esperantistoj.

## “NI ĈIUJ FARIĜIS BRAVULOJ!”

La Granda Muro estas unu el la mondaj mirakloj rigardinda por ĉiu eksterlanda turisto. Ĝi fariĝis la unua haltloko en la tagordo de niaj samideanoj.

La Granda Muro konstruita en la ondanta montaro estas kruta

kaj peniga kelkloke, sed neniu el la gastoj malstreĉiĝis en la surprizado. Iuj de tempo al tempo levis sian kodakon por foti la imponan konstruaĵon.

“Ho, kia mirindaĵo!” Revenvoje al la hotelo la gastoj unuvoĉe admiris la muron. Mi demandis, kiuj atingis la plej altan parton de la muro, kaj plejparto de ili faris jesantan manlevon. Mi deklamis al ili verson verkitan de prezidanto Maŭ Zedong: “Kiu ne atingos la Grandan Muron, ne

*En la bonveniga kunveno okazigita de la Uhan-a Esperanto-Asocio*





*Svisa esperantistino s-ino Yvonne Cotton kaj ĉina infaneto*

estos bravulo.” Ili diris: “Ni ĉiuj fariĝis bravuloj!” Plej ĝojis laborantino de UEA s-ino Sija, ĉar ŝi la unua atingis ĝian supron.

### **INTER ORDINARAJ ĈINOJ**

Kiam vi aĉetas delikatajn ĉinajn porcelanaĵojn por via familio, kiam vi donacas luksan ĉinan jadan kolĉenon al via amiko en datreveno de lia naskiĝtago, kiam vi ĉeestas festenon en ĉina brodita silka vesto aŭ kiam vi montras vian ĉinan santallignan ventumilon al viaj amikinoj por aprezo, ĉu vi scias, kiel ili estas faritaj?

Ilian faradon ekkonis la membroj de la vizitgrupo post kiam ili vizitis fabrikan de porcelanaĵoj, brodejon kaj jadaĵ-farejon en Ĉangŝa, silk-teksejon en Hangĝoŭ kaj fabrikan de santallignaj ventumiloj en Suĝoŭ. Tie ili rigardis longan delikatan manlaboradon. En Hangĝoŭ ili plukis tefoliojn en tegardeno, rigardis prilaboradon de la fama verda teo de Longĝing kaj ĝuis freŝe prilaboritan teon.

Niaj gastoj vizitis ankaŭ elementan lernejon, geknaban palacon kaj laboristan kaj kamparanan familiojn en Nankino, Ŝan-

hajo kaj Ĉangŝa por koni la ĉinan edukan sistemon kaj la vivon de ĉinoj. Iun tagon, post pluveto, la vizitgrupo venis al akva kamparo en suda Ĉinio. Tiam la kamparanojn okupis priklado de rizidoj. Nemalmultaj el niaj samideanoj sentis apartan ĝojon, ĉar ili unuafoje vidis belan printempan pejzaĝon en la kamparo de suda Ĉinio. Dum vizito al familio riĉiĝinta en la lastaj du jaroj en antaŭurbo de Ĉangŝa svisa inĝeniero Armand tre interesiĝis pri la metanaj cisterno kaj forno. Li esprimis, ke li volonte okupiĝos

pri metana afero en Ĉinio, se necese.

“Saluton!” “Dankon!” Niaj samideanoj uzis tiujn ĵus lernitajn ĉinajn vortojn ĉie, kie ili renkontis afablajn ĉinajn infanojn, junulojn kaj maljunulojn. Germana s-ano Elfriede plurfoje diris al mi sian impreson: “Ni renkontis tre amikajn homojn. Iliaj vizaĝoj radias memfidon kaj kontenton.”

### **ESPERANTISTOJ-TURISTOJ EGE BONVENAJ**

Preskaŭ ĉiuj esperantistoj-turistoj ricevis akcepton ne ĝueblan por alilingvanoj. Ĉie, kien ili venis, ili estis varme bonvenigitaj de ĉinaj esperantistoj kaj akompanataj de ili dum sia ekskurso. Neniu el ili atendis, ke kiam ili atingis la stacidomon de Ĉangŝa en ventopluga kaj subite malvarmiĝinta profunda nokto, pli ol tridek ĉinaj esperantistoj atendis ilin sur la kajo svingante verdajn flagetojn, ke kiam ili en du grupetoj elvagoniĝis en du stacioj de Uhan je la kvara frumatene, ili ricevis bonvenigon de reprezentantoj de la tieaj esperantistoj.

*S-ro John Rapley, laboranto de UEA, inter Ŝanhajaj esperantistoj*








La vizitgrupo sur la Granda Muro

## Sep-landa Esp-ista vizitgrupo en Ĉinio

Fotoj de GONG PEJKANG


La vizitgrupo gastas en la Ĉina Esperanto-Ligo. De dekstre: s-ro Gang Ĉjiĉeng, ĝenerala sekretario de ĈEL, estro de la vizitgrupo s-ino Nancie Durham, itala s-anino Ada Bessone kaj s-ro Li Ŝiĝjun, vicĉefredaktoro de EPĈ.





“Ĉu vi aŭdis min?” La gastoj provas la eĥomuron en la Ĉiela Altaro.

La vizitgrupo en laborista familio de Ŝanhajo




La vizitgrupo rigardas antikvan astronomian instrumenton en Ziĝinŝan-observatorio de Nankino.





Svisa esp-istino Yvonne Cotton kaj juna komencanto de Nanĉang



Gesamideanoj de Britio, Francio kaj Danlando sur la Okcidenta Lago en Hangĝoŭ








Esp-istino de Ĉangŝa instruas al la gastoj la tradician ĉinan gimnastikon.



La gastoj vizitas fabrikan de santallignaj ventumiloj en Suĝoŭ. Tio plej interesas germanan esp-istinon Greta Deutsch.

La gastoj rigardas pentradon de ĉina artisto en Uhan.





Basulo Marcel Roșca

Kantisto Gheroghe Turda

## Rumanaj artistoj en Ĉinio

En la tria tagdeko de aprilo la Voĉ- kaj Instrumentmuzika Trupo de Rumanio turneis en Pekino, Jinĉuan kaj Ŝji'an. La artistoj prezentis verkojn de Porumbescu kaj Brahms, rumanajn popolajn instrumentkaj dancmuzikojn kaj ankaŭ la ĉinan instrumentmuzikon "Granda Pekino". Ilia bela ludo ricevis varman aplaŭdon de ĉinaj spektantoj.



Pajnoŝalmisto Șandor Gavrilă

Fama kantistino Stefania Rareș





Ĉu en la Somera Palaco, Imperiestra Palaco kaj Ĉiela Altaro de Pekino, ĉu en Ŝĵuan'uhu-parko de Nankino, ĉu en la Botanika Ĝardeno de Hangĝoŭ kaj Donghu-parko de Uhan, lokaj samideanoj volontis akompani la gastojn malgraŭ sia okupiteco. Inter ili troviĝis veteranoj kaj junaj komencantoj. Iuj el ili estis iliaj multjaraj korespond-amikoj kaj multaj — nekonatoj. Sed kiam ili kunestis, ili sentis sin kiel malnovaj amikoj kaj ĉiam montris grandan bedaŭron ĉe adiaŭo. Tiaokaze mi ofte fariĝis "tedulo", ĉar pro tempolimo mi devis urĝadi ilin al aŭtomobilo.

Ĉe la fino de la vojaĝo mi demandis gastojn, kio estas la plej impresa por ili. Ĉu kantoj kaj dancoj de la tria porinstruista Esperanto-kurso de Pekino aŭ prezentado de esperantistoj de Suĝoŭ en la bonveniga kunveno? Ĉu bela klarigo pri muzeaj ekspoziciaĵoj farita de ĉiĉerono de Ĉangŝa, kiu lernis nian lingvon de antaŭ tri monatoj, aŭ fluaj salutvortoj de s-ro Sun en la bonveniga kunveno aranĝita de esperantistoj de Uhan? . . . Mi ne atendis, ke la demando embarasis la gastojn, ĉar, ĝuste kiel s-ino Cotton diris, ĉio estas interesa kaj impresa.

Ĉe la fino de mia raporto resonis ĉe miaj oreloj la kanto "Ĝis Revido" kune kantita de la sep-landaj kaj ĉinaj esperantistoj kaj reaperis la bedaŭra adiaŭo sur la kajoj de Ĉangŝa kaj Uhan. Kiam la revido? S-ino Nancie esperas, ke tio okazos en la Universala Kongreso de Esperanto en 1986 en Pekino. Mi pensas, ke tio estas certa.



**Tarifo:** 1 internacia respondokupono por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

\* Fondgrupo por nova organizaĵo pri E. en komerco kaj ekonomio invitas proponojn de kunlaboro. Aparte serĉataj estas tiuj, kies laboro iel rilatas al komerco aŭ industrio, ekzemple ĉe banko, asekura kompanio, trafika entrepreno, eldonejo, esplorinstanco aŭ simile. La provizora adreso estas: Komerca Fakgrupo, Postbus 25041, 3001 HA Rotterdam, Nederlando.

\* Instituto Goiano de Esperanto serĉas gekorespondantojn por siaj gelernantoj en baza nivelo (ekde 16-j.) Estas bonvenaj leteroj tutmondaj pri ĉiuj temoj. Instituto Goiano de Esperanto, Av. Goiás n° 636 s/104 Centro, Goiânia-Goiás-Brazilo-CEP 74000.

\* Deziras korespondi kun ĉina esperantisto pri Taiĝiĉuan kaj Tui-na s-ro Hector Palacios, Casilla de Correo 35, RA 5147 Argüello-Cordoba, Argentino.

\* Tomasz Kubiszewski (16-jara lernanto), Wrocław, str. Zau lek Rogozinski 4/6 51-116 Pollando deziras korespondi en Esperanto kun tuta mondo pri literaturo, moderna muziko, sporto, historio, ŝako kaj interŝanĝo de pm., bk., diapozitivaj, mod-revuoj, gramofondiskoj, magnetofonaj kasetoj.

\* 35-j. juristino deziras korespondi tutmonde kun samfakuloj pri ĉiutaga vivo kaj ŝatas kontaktiĝi kun Esp-familioj, Carola Lehr, Brauereistr. 56, GDR-2000 Neubrandenburg.

\* Deziras korespondi kun tiuj, kiuj planas viziti Japanion en estonteco, HUZIMAKI Ken'iti Okaisiki 501, Numazu-si, sizuokaken 401 Japanio.

\* 14-jaraj polaj knabinoj dez. kor. tutmonde pri diversaj temoj. Katarzyna Ratajczak, ul. Kapernicka 2a/19, 63-400 OSTROW WLKP, Pollando; Ela Smektala, ul. Manifestu Lipcowego 32c/5, 63-400 OSTROW WLKP, Pollando.

\* Helena Byl (21-j.) dez. kor. kun geesp-istoj tutmonde pri ĉiutaga vivo, kutimoj, literaturo, geografio. Adreso: Rzepowo 10, 76003 Sucha Kosz, woj. koszalinskie, Pollando.

\* Henry Erlandson, Box 14, S-71030 Gyttorp, Svedio dez. interŝ. p.m. komence samkvante kaj daŭrige laŭ interkonsento.

\* Csibi Mariu Magdolua (15-j.) Str. Hunga ur 12 hoc. DITRAU 4214 Jud. Harghita Romanio, dez. kor. kun amikoj pri diversaj temoj ĉefe el Hungario, Ĉeĥoslovakio.

\* Hampoth Arma-Maria (15-j.) str. Dealul-Frumos ur. 41 hoc. DITRAU 4214 Jud. Harghita ROMANIO dez. kor. kun amikoj pri diversaj temoj ĉefe el Hungario, Rumanio, Germanio, CCCP.

\* 21-jara Miro Košar dez. kor. tutmonde pri la temoj de radiokomunikado kaj komputilo en Esperanto, angla aŭ germana lingvo. P.O. Box 22, Maribor 62000, Jugoslavio.

\* Juna svislandano (18-j.) serĉas korespondemulojn el Ĉinio kaj Japanio. Adr.: Vreni Mock, Buchen/Steinegg, CH-9050 Appenzell, Svislando.

# Kapriĉe pri la ĉeĥoslovaka muzika jaro

**L**A impona rivero Vltava fluas tra arbaro, tra verdaj kampoj, ĉirkaŭiras grizajn kastelojn kaj poste torentas al Prago plena de florantaj siringoj. La rivero sinofere nutras la belan kaj fekundan teron de Bohemio, kaj ankaŭ la saĝan ĉeĥoslovakon nacion kaj ĝian brilan kulturon.

La kuranta jaro estas la tria ĉeĥoslovaka muzika jaro. Ĝi refoje montros riĉajn ĉeĥoslovakajn klasikajn kaj modernajn muzikajn verkojn, kiuj ĝuas altan reputacion en la mondo. Kun granda intereso mi direktas mian atenton al ĉi tiu signifoplena memoriga aktivado kaj esprimas mian varman gratulon, kiel muzikisto dufoje vizitinta tiun landon famkonatan kiel muzika nacio.

Kiu bone konas la historion de la eŭropa muziko, tiu certe scias pri la flora periodo de la ĉeĥoslovaka muziko en la 18-a kaj 19-a jarcentoj kaj scias ke la ĉeĥoslovakoj vivas en muziko. Ĉeĥoslovakio, hejmlando de Bedrich Smetana, "patro de Bohemia muziko", kaj Antonin Dvorak, "Bohemia Schubert", estas rigardata kiel unu el la landoj plej disvolviĝintaj muzike en Eŭropo. Burney eĉ nomas Bohemion "konservatorio de Eŭropo". En diversaj historiaj periodoj la ĉeĥoslovaka popolo kaj ĝiaj muzikistoj kreis muzikajn verkojn saturitajn de patriotismo kaj frapa nacia stilo, kiuj spegulis la gravajn historiajn eventojn kaj spiritan fizionomion de la popolo, kaj esprimis la

vivdeziron kaj optimismon de la popolo. Ili ne nur fariĝis granda forto kuraĝigi la popolon antaŭen, sed ankaŭ kompreneble okupas gravan paĝon en la muzika historio de la mondo.

## ĈEĤOSLOVAKA MUZIKO EN ĈINIO

La ĉinaj muzikistoj kaj melomanoj tre respektas la elstarajn muzikajn majstrojn kiel Smetana kaj Dvorak, kaj tre ŝatas iliajn verkojn.

Frue en la revoluciaj militaj jaroj antaŭ la fondiĝo de la nova


*La aŭtoro estas arta direktanto kaj direktisto de la Centra Filharmonio de Ĉinio..*



*La aŭtoro (la tria de maldekstre) kaj la direktanto (en la malantaŭo) de la Teplice-a Orkestro*



*La aŭtoro subskribas por geknaboj en la urbo Bratislava.*



Ĉinio, kvankam Jan'an, tiama revolucia bazloko, havis ne perfektan orkestron, tamen la orkestroj jam prezentis «Humoreskon» de Dvorak. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, famaj verkoj de ĉeĥoslovakaj muzikistoj estis pli vaste diskonigataj en Ĉinio. Ekz. la uverturo kaj la «Ario Marenka» de la komika opero «La Vendita Novedzino» verkita antaŭ cent jaroj, la «Odo de Luno» el la lirika opero «Rusalka»; kaj la instrumentaj muzikaĵoj, ekzemple «Polko» kaj la violona solo «Mia Hejmloko» de Smetana, «Slavaj Dancoj», «Humoresko», la «Violonĉela Konĉerto en B Minora», «Korda Kvarteto en F Maĵora» de Dvorak, la «Kvarteto de Blovinstrumentoj» de J. Stamitz kaj aliaj, ĉiuj estas repertuaroj ofte ludataj de ĉinaj muzikistoj en koncerto. Iuj famaj ĉinaj konservatorioj ofte prenas verkojn de ĉeĥoslovakaj muzikistoj kiel instruaĵojn. Krom la supre menciitaj estas ofte ludataj ankaŭ la «Fluta Konĉerto», de Vilém Blodek, «Klaraneta Konĉerto», «Hoboja Konĉerto» de F. V. Kramár, «Fagota Konĉerto» de Jiri Pauer kaj aliaj de ĉeĥoslovakaj komponistoj. «Mia Patrujo», programa simfonipoe-

ma suito de Smetana kaj la naŭa simfonio «El la Nova Mondo» de Dvorak havas vastan influon en Ĉinio, precipe la lasta estas ofte prezentata ne nur en grandaj urboj kiaj Pekino, Ŝanhajo kaj Kantono, sed ankaŭ en la ne konata urbo Dukoŭ de Siĉŭan-provinco. La orkestro de la Ŝenŝji-a Ensemblo ankaŭ prezentis «El la Nova Mondo» en la unua koncerto post sia establiĝo. Oni ankaŭ adaptis poemon al la belmelodia dua movimento de tiu ĉi simfonio kaj multaj povas kanti la muzikopecon. Ankaŭ ĉinaj radio-stacioj kaj TV-stacioj ofte disaŭdigas elstarajn verkojn de la grandaj ĉeĥoslovakaj komponistoj, inkluzive de «Mia Patrujo» kaj «El la Nova Mondo».

Mi faris egalajn rekomendon kaj klarigon pri «El la Nova Mondo» kaj klasikaj verkoj de Betoveno kaj Ĉajkovskij, kiam mi prelegis en muzikaj kursoj aranĝitaj de la Laborula Kultura Palaco de Pekino kaj multaj altlernejoj tra la tuta lando. Kompreneble, mi konigis la senmortajn verkojn de la majstroj kaj ankaŭ iliajn penson kaj kredon, ekz., la sentencon de Smetana: «Mi nepre batalos ĝis kiam nia

arto forskuos la katenojn de stulteco, mallerteco kaj diversaj egoismaj celoj, se nur mi havos forton» kaj la sentencon de Dvorak: «Ankaŭ artisto havas sian patrujon, kaj li devas esti firme fidela al ĝi kaj ami ĝin!» Mi pensas, ke ĉiu el ni povas ĉerpi el tiuj vortoj edifon.

## MUZIKO PROKSIMIGIS NIN

Nelonge post sia fondiĝo en 1951, la nova Ĉinio sendis grandan junulan ensemblon al Ĉeĥoslovakio kaj aliaj orienteŭropaj landoj. La ensemblo estis varme kaj amike akceptita de ĉeĥoslovakaj popolanoj kaj muzikistoj. La orkestro de la ensemblo estis la rudimento de la simfonia orkestro de la poste fondita Centra Filharmonio. Multaj el ĝi fariĝis gravaj membroj de la orkestro de la nomita filharmonio.

Al la 11-a Internacia Muzika Festivalo de Praga Printempo en 1956 nia lando sendis solistan grupon, ankaŭ mi speciale veturis el Sovetunio por kune prezenti kun la grupo. Mi direktis la gastigantan orkestron en ludado de la «Simfonio en D Minora» de C. Franck kaj «Vespero» de He



*La aŭtoro kaj infano  
ĉe la Teplice-a  
Varmfonto*

Luting, mongola muzikaĵo «Sumĉidema» kaj aliaj ĉinaj kaj fremdaj verkoj. Kunlaborante kun pianistino U Leji, flutisto Li Ŝjueĉjŭan kaj ĉeĥoslovaka violonisto A. Ploček, la orkestro ludis «La Unuan Pianan Konĉerton» de Liszt Ferencz, la «Flutan Konĉerton en D Maĵora» kaj la «Violonan Konĉerton en A Maĵora» de Mozart. Estis granda sukceso. Mi bone memoras, ke edzino de ĉeĥoslovaka ministro admiris post la rigardo: «Ĉinio akiris tiel grandan atingon en la eŭropa muziko nur post kelkaj jaroj de post sia fondiĝo.»

Tiam nin surprizis ankoraŭ unu fakto: En Ĉeĥoslovakio eĉ ekzistas ensemblo, kiu konsistas el ĉeĥoslovakoj kaj ludas muzikaĵojn per ĉinaj kordaj kaj bambuaj muzikiloj! Ni aŭskultis ĝian brilan prezenton kun granda ĝojo kaj intimeco.

Ĝis nun mi ne forgesis sinjoron Libal kaj interpretistinn Anna, kiuj akompanis nin 50 tagojn dum nia vojaĝo tra la tuta lando. Libal kapabla, kun fajra fervoro al la ĉina popolo, profunde impresis min. Mi revidis lin en Pekino en 1959. La tre dokta Anna flue parolis en la ĉina lingvo kaj estis tre varmkora kaj se-

rena. Nun ŝi jam fariĝis profesoro kaj ĉinologo. En 1982 mi revidis ŝin en Pekino.

En 1959 la Ŝtata Simfonia Ensemblo de Ĉeĥoslovakio venis al nia lando invitite. Tiu elstara ensemblo prezentis la uverturon de «La Vendita Novedzino» kaj la muzikaĵojn «El la Nova Mondo», «Sumĉidema» kaj aliajn sub la direkto de mia ĉeĥoslovaka amiko Carl Anĉel, kio profunde impresis la ĉinajn aŭskultantojn. Kiam ĝi turneis en Ŝanhajo, ĝi celebris sian cent-fojan koncerton kaj ricevis varmajn gratulojn de la ŝanhajaj muzikistoj.

Alia fama ĉeĥoslovaka direktisto iam venis al Ĉinio trejni la orkestron de la Centra Opera Trupo kaj direktis ĝin en ludo de «El la Nova Mondo».

En 1959-1961 majstro-flutisto Anost Bourek, majstro-hobojisto Vitěslav Hanus kaj majstro-fagotisto Komorous el Ĉeĥoslovakio instruis kaj lekciis respektive en la konservatorioj de Pekino, Ŝanhajo kaj Uhan. Ili faris valorajn kontribuojn per siaj diligentaj laboroj en kulturado de ĉinaj muzikistoj de ligna blovinstrumento.

Ankaŭ la sukcesoj en la interŝanĝo de studentoj inter niaj du landoj estis neforgeseblaj. Inter ili la fama ĉina hoboĵoludistino Taŭ Ĉunŝjaŭ, kiu lernis en la Arta Instituto de Prago kaj gajnis la trian lokon en la 1959-jara 7-a Monda Junula Festivalo en Vieno. Ĉeĥoslovaka studentino U Tangni (ŝia ĉina nomo), lerninta en la Centra Konservatorio de Pekino, rikoltis rimarkindajn atingojn kaj verkis libron pri la muzika penso de konfuci-anoj.

Mi ĝoje vidis, ke post pli ol 20 jaroj, Ĉinio denove sendis en 1983 soprano-kantistinn Hu Ŝjaŭping al la 38-a Internacia Muzika Festivalo de Praga Printempo, ŝi estis varme bonvenigata kaj atentata de la muzikistoj kaj ĵurnalisimo. Muziko proksimigis nin denove.

En Ĉinio cirkulas fama verso: «Ĉiuj vivu longe kaj kune ĝuu la lunon en distaj lokoj». Mi kredas, ke amika kontakto de la popoloj kaj muzikistoj inter Ĉinio kaj Ĉeĥoslovakio ĉiam pli multiĝas kiel la senĉesa fluo de la Flava Rivero kaj la rivero Vltava.

Pli riĉajn kaj belajn atingojn al vi en la Ĉeĥoslovaka Muzika Jaro!



# Tajĝiĉŭan trans landlimon

**T**AJĜIĈŬAN estas unu el la gravaj bokso-specoj de la ĉina lukarto. Ĝi kreiĝis sur la bazo ĉerpi kaj kunfandi la distingajn ecojn de aliaj ĉinaj bokso-specoj kaj formis diversajn skolojn dum sia longtempa disvastiĝo kaj disvolviĝo. Stile la diversaj skoloj de Tajĝiĉŭan diferencas inter si, tamen ili havas komunajn karakterizaĵojn, t. e. la movoj estas mildaj, malrapidaj, egalritmaj kaj kontinuaj, la manoj kaj piedoj moviĝas ĉiam arkforme kaj harmonie kaj la korpo moviĝas kiel unu tuto kun la talio kiel akso.

Tajĝiĉŭan aparte postulas kunordiĝon de spirado kun korpaj movoj, harmonion inter mensa aktivado kaj korpaj movoj. Tial ĝi havas iujn apartajn efikojn por fortigi la menson kaj korpon.

Pro siaj ĉarmaj movoj kaj mirakla saniga efiko Tajĝiĉŭan ne nur estas ŝatata de sennombraj ĉinoj kaj fariĝis ilia plej populara sporto, sed ankaŭ allogas multajn fremdlandanojn. Hodiaŭ, ĉu en Japanio kaj sudorienta Azio, ĉu en iuj eŭropaj kaj amerikaj landoj, ĉie troviĝas Tajĝiĉŭan-ekzerkantoj. Tajĝiĉŭan kiel floro de la ĉina antikva civilizacio nun cirkulas tra la mondo.

En aprilo ĉi-jare okazis en la ĉina urbo Uhan la Internacia Tajĝiĉŭan-a Prezento. Ĝi estis la unua internacia interflua aktivado en la historio de disvolvo de Tajĝiĉŭan. Ĝi havigis al la partoprenantoj de diversaj landoj bonan ŝancon interŝanĝi sperton kaj altigi sian ludarton.

Proksimume cent partoprenantoj de 14 teamoj el diversaj

landoj kaj regionoj faris prezentadon.


S-ino Bow-Sim Mark estas trejnistino de la teamo de la Usona Bostona Esplora Instituto de la Ĉina Lukarto. Kun la teamo sub sia gvido, ŝi venis al Ĉinio kaj persone faris prezentadon. En ĉin-stila vesto el blanka silko kaj blankaj trejnaj ŝuoj ŝi aspektis kiel eminenta majstrino de la ĉina lukarto. Ŝi faris movojn aplombajn, harmoniajn kaj kontinuajn sen spirego. Tio plene montris ŝian rafinitan lertecon.

Kanada s-ino Andrea Falk lernis speciale la ĉinan lukarton en la Pekina Fizik-kultura Instituto kaj revenis al la hejmlando post la diplomitiĝo. Nelonge post tio ŝi venis al Ĉinio por partopreni en la prezento. Ŝia prezento distingiĝis per harmonia kombino de delikataj kaj mildaj movoj kun firmaj kaj tiel ricevis varman aplaudon de la spektantoj.

Plej multnombraj estis la japanaj partoprenantoj, ĝenerale kun relative alta ludarto. Endo Yasuhiko kaj Hoshino Minoru estis junaj elektitoj de la Japana-Ĉina Tajĝiĉŭan-interflua Asocio. Iliaj movoj karakteriziĝis per stabilaj kaj firmaj movoj, perfekta kunordiĝo de forteco kaj mildeco. En la prezento ne nur belis iliaj pozoj, sed ankaŭ montriĝis ritmo de Tajĝiĉŭan. S-ino Takeda Sachiko, prezidantino kaj trejnistino de la Japana Virina Tajĝiĉŭan-Asocio, prezentis Tajĝiĉŭan kun spado. Ŝiaj spadaj kaj korpaj movoj estis tiel harmoniaj kiel unu tuto. Ŝia prezento



*Japana sportistino s-ino Takeda Sachiko en prezento*



*Ĉina sportistino Ge Cunjan (la dua de maldekstre), kiu gajnis la plej altan poentaron en la prezentado, helpas sportistojn de la Bostona teamo de Usono.*

rikoltis manklakadon de la ĉeestantaro kaj laŭdon de famaj ĉinaj specialistoj.

Post la prezentado fama ĉina majstro Ĉen Ŝjaŭŭang diris al mi, ke de la lastaj jaroj multaj Tajĝiĉŭan-amantoj de diversaj landoj, precipe de Japanio, venis al Ĉinio por lerni la arton. Inter ili troviĝis Endo Yasujiko kaj Hoshino Minoru. Tuj antaŭ tiu prezentado iuj japanaj partoprenantoj venis al Henan por peti de li helpon. Ĉen Ŝjaŭŭang diris ankaŭ, ke Ĉinio estas hejmlando de Tajĝiĉŭan kaj havas multe da famaj majstroj, tial en la lastaj jaroj multaj landoj invitis ilin instrui Tajĝiĉŭan. Ĝis nun dekoj da ĉinaj luktartistoj vizitis Usonon, Japanion, Singapuron, Francion, Brition kaj Meksikion, kaj iuj nun prelegas en Usono, Meksikio kaj aliaj landoj.

Al la ĉi-foja prezentado oni invitis ne nur diverslandajn ludistojn, sed aparte 12 ĉinajn majstrojn de diversaj skoloj por instruado. Ĉiu el la lastaj havas sian lertaĵon kaj ĝuas renomon en Tajĝiĉŭan-rondo. Kvankam 70-80-jaraj, ili restis ankoraŭ viglaj kaj energiplenaj. La rafinita perfekteco de ilia ludarto videblis en ĉiuj iliaj movoj.

Plej rimarkinda estis centjara majstro s-ro U Tunan, kiu celebris la 100-an datrevenon de sia naskiĝtago en februaro ĉi-jare. Li estis tre sana kaj vigla, kun arĝentaj hararo kaj barbo. En nigra ĉina kostumo li prezentis U-skolan Tajĝiĉŭan. Post la prezentado li diris: "Tajĝiĉŭan postulas, ke ĉiuj movoj estu trankvilaj, malrapidaj, egal-ritmaj, mildaj kaj malstreĉaj, ke la praktikanto kun absorbata menso kaj stabila animo ekzercu samtempe la vitalajn

organojn interne kaj la korpon ekstere. Longtempa ekzercado povas fortigi la sanon kaj longigi la vivon." Li diris humure, ke lia korpo estas elokventa atesto de la saniga efiko de Tajĝiĉŭan.

Famaj majstroj de diversaj skoloj montris sian arton. Inter alie troviĝis diversaj specoj de Tajĝiĉŭan, tiu kun spado, tiu kun glavo, tiu kune prezentita de du personoj kaj tiu simpligita. La spektatoroj ĉinaj kaj fremdlandaj tre admiris ilian perfektan ludar-

*Usona sportistino Jean M. Lukitsh en prezentado*






ton. Iu japana sportisto diris: “De longe mi deziris koni la ortodoksan skolon de Tajĝiĉŭan, kaj hodiaŭ realiĝis mia deziro. La prezentado de ĉinaj majstroj pruvis, ke Ĉinio efektive estas naskiĝlando de Tajĝiĉŭan.”

Inter la partoprenantoj alilandaj troviĝis nemalmultaj kiuj persone profitis el ekzercado en Tajĝiĉŭan. Usona sportistino Jean M. Lukitsh diris al mi, ke antaŭ ol lerni Tajĝiĉŭan, ŝi ofte suferis de malsaneto. Post kelkmonata ekzerciĝado per Tajĝiĉŭan ŝi eksentis sin multe pli bone. S-ino Bow-Sim Mark konigis al mi iun altstaturan maldikan s-ron: “Li suferis nervan konvulsion ĉe siaj dekstraj mano kaj piedo kaj iris ofte ŝancelpaŝe. Li vizitis kelkajn hospitalojn, tamen la kuracado estis senefika. Antaŭ du jaroj li komencis lerni de mi Tajĝiĉŭan. Nun liaj mano kaj piedo funkcias preskaŭ normale.”

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949, subtenate de la popola registaro, la ĉinaj specialistoj pri Tajĝiĉŭan kreis diversajn specojn de simpligita Tajĝiĉŭan surbaze de la tradicia Tajĝiĉŭan por kontentigi la bezonon de korpa ekzercado de la popolo kaj ankaŭ por heredi la kulturon de la patrujo. Ke loĝantoj de urboj kaj urbetoj de Ĉinio ekzercas sin per Tajĝiĉŭan, tio jam fariĝis socia moro. Mi prenu Pekinon kiel ekzemplon. En la urbo troviĝas pli ol 160 instruaj stacioj, kaj ĉiujare pli ol cent mil homoj sin anoncas por lerni Tajĝiĉŭan. En la suda ĉina urbo Kantono oni fervore lernis Tajĝiĉŭan dum la lastaj jaroj. Laŭ statistiko, ĉiujare pli ol 400 000 homoj lernas Tajĝiĉŭan en la instruaj stacioj.

*La centjara majstro s-ro U Tunan en prezentado*



En la lastaj jaroj en diversaj lokoj de la mondo ĉiam plimultiĝis homoj, kiuj interesiĝis pri Tajĝiĉŭan, kaj naskiĝis organizoj por disvastigi kaj instrui Tajĝiĉŭan. Ekzemple, en Bostono de Usono troviĝas dekkelkaj trejnistoj de Tajĝiĉŭan, kiuj starigis ekzercejon kaj varbis disĉiplojn. La Bostona Esplora Instituto de la Ĉina Luktarto kaj la Taichi-Instituto de Filozofio kaj Arto Bellingham, Vaŝingtonio, kiuj partoprenis en la prezentado, komencis instrui Tajĝiĉŭan en la sepdekaj jaroj. Ili diplomis jam pli ol mil homojn. la Franca Tajĝiĉŭan-Asocio en Parizo estas la plej granda Tajĝiĉŭan-organizo en Eŭropo. Ĝia prezidanto diris al mi, ke la asocio fondita en la sepdekaj jaroj havas filiojn ne nur en la ĉefaj urboj de Francio, sed ankaŭ en la najbaraj landoj

Belgio kaj FR Germanio, kun pli ol dekmil membroj. Japanio kaj Singapuro donis ekzemplon popularigi Tajĝiĉŭan por aliaj aziaj landoj. Al la ĉi-foja prezentado venis ses teamoj el Japanio. Nun en tiu lando ĉirkaŭ 300 000 homoj sin ekzercas per Tajĝiĉŭan. Ankaŭ en Singapuro troviĝas pli ol dekmil Tajĝiĉŭan-ekzercantoj.

Kiel originala bokso-speco, Tajĝiĉŭan havas historion de almenaŭ 300 jaroj kaj pli kaj pli disvastiĝas. Kiam finiĝis la prezentado, la partoprenantoj de diversaj landoj adiaŭis unu alian kun granda bedaŭro. Vidante tian kortuŝan scenon, mi tuj venis al la konkludo, ke Tajĝiĉŭan, tiu floro de antikva civilizacio, akvumate de la diverslandaj popoloj, certe prosperos kun nova aromo.

# La Kulturo de la Dinastioj

## Song kaj Ĵuan

de BA HONG

**D**UM la tempo de la dinastioj Song kaj Ĵuan (960-1368 p. K.) estis tre vigla la ekonomia interŝanĝo inter la ĉinaj naciecoj, pli prosperis ankaŭ la meti-industrio, komerco kaj urba ekonomio. Surbaze de tio la kulturo, scienco kaj teknologio havis rimarkindan progreson.

### TRI GRANDAJ INVENTAĴOJ

Presarto, kompasoj kaj pulvo, la tri grandaj inventaĵoj de la





Bi Ŝeng

antikva ĉina popolo, havis pluan disvolviĝon dum tiu tempo.

Ksilografia presarto en Song-dinastio vigle disvolviĝis. Tiam la libroj havis belformajn ideografiaĵojn kaj estis bele binditaj. En la mezo de la 11-a jarcento Bi Ŝeng de la Norda Song-dinastio inventis tipografion. Li faris egalgrandajn kubetojn el argilo kaj gravuris sur ĉiu el ili po unu ideografiaĵo. Bakite, tiaj argilaj tipoj povis esti uzataj en kompostado. Fininte presadon, oni povis ilin malkomposti por posta uzo. Tial oni nomis ilin moveblaj ideografiaĵoj. La tipografio malfermis novan paĝon en la historio de presarto.

La ĉina tipografio estis enkondukita unue en Koreion, poste en Japanion kaj Egiption. Nur en la 15-a jarcento eŭropanoj ekuzis tipografion.

En la periodo de Militantaj Regnoj (475 a. K. — 221 a.K.) la ĉina popolo trovis, ke magneto ĉiam montras la sudon, kaj per ĝi faris direkto-montrilon *sinan*. Ĝi konsistis el kupra plato kun direktomontraĵoj kaj glata magneta kulero fiksita sur la akso starigita meze en plato. Ĝin uzante oni turnis la kuleron por ke tiu revoluu. Kiam ĝi haltis, ĝia tenilo ĉiam montris la sudon. En la Norda Song-dinastio jam aperis artefarita magneta nadlo. En la

Supre: Kompassoj; Malsupre: *Sinan*


komenco la nadlo flosis surakve kaj povis libere turniĝi, aŭ estis metita sur glatan bovlo-randon por rivoluigi ĝin. Estis la plej bona metodo: Oni ligis silkan fadenon sur la mezon de nadlo per vakso, por ke ĝi turniĝu. Poste oni faris kompasojn per nadlo kaj uzis ĝin en mara navigacio. Dum la tempo de la Suda Song-dinastio ĉinaj komercistoj ekipitaj per kompasoj ofte navigis inter Ĉinio, insuloj de la sudorienta Azio kaj la Hindia Oceano. Arabaj kaj persaj komercistoj ofte veturis per ĉinaj marŝipoj, ankaŭ ili ellernis uzi kompasojn.

Pulvo estis inventita de antikvaj ĉinaj alĥemiistoj en farado de eliksiroj. Sun Simjaŭ, medicinisto de Tang-dinastio (618-907 p. K.), plej frue notis metodon fari pulvon el miksitaj salpetro, sulfuro kaj lignokarbo. En la lastaj





Pulvotubo



Pulvosago

jaroj de Tang-dinastio pulvo komencis esti uzata en milito. La Norda Song-dinastio vaste uzis pulvon en la bataloj kontraŭ la regnoj Ljaŭ, la Okcidenta Ŝja kaj Ĝin kaj por tio fondis pulvo-farejojn. En ĉ. la 13-a jarcento Ĉinio jam povis fari eksplodigeblajn bombojn. Tiam oni plenigis fer-potojn per pulvo kaj pafis ilin per ŝton-ĵetiloj, ekbruliginte ilian meĉon, por vundi malamikojn. Oni nomis ilin “feraj kanonoj” siatempe.

La pulvo-fara metodo estis enkondukita de Ĉinio en islamajn landojn en la 13-a jarcento kaj en Eŭropon en la 14-a jarcento.

### SCIENCISTOJ ŜEN KŬO KAJ GŬO ŜOUĜING

Ŝen Kŭo (1031-1095 p. K.), fama sciencisto en la Norda Song-dinastio, okupiĝis dum la tuta vivo pri scienca esplorado. En siaj lastaj jaroj li verkis la libron “Notoj en Mengŝji”, kies enhavo traktis politikon, ekonomion, kulturon, militaferojn, sciencojn kaj teknikojn.

Ŝen Kŭo atingis elstarajn sukcesojn en geologio. Li trovis mitulŝelojn kaj ŝtonetojn bende vicigitajn ĉe monttalo de Tajhangmontaro kaj asertis, ke antikve tie estis marbordo kaj la vasta

ebenaĵo oriente de la montaro estis kovrita de maro, poste pro la erozio kaj grunda sedimentado la maro iom post iom ŝanĝiĝis en kontinenton. La scienca aserto estis prezentita ĉ. 700 jarojn pli frue ol tiu en Eŭropo.

En la astronomia kalendaro, li kreis kalendaron kun la printempkomenco (la 3-a, 4-a aŭ 5-a de la nuna februaro) kiel la unua tago de la jaro. Laŭ lia kalendaro unu jaro konsistis el 365 tagoj kaj ĉiuj ĝiaj 12 monatoj konsistis alterne el 31 aŭ 30 tagoj. Tia kalendaro utilis al agrikultura produktado. Post pli ol 800 jaroj simila kalendaro aperis en Eŭropo. Li montris ankaŭ, ke la kompasso “montras la sudon, tamen ĝia nadlo ofte devias iom orienten”. Evidentiĝis, ke li jam trovis la magnetan devion. Lia trovo estis kvin jarcentojn pli frua ol tiu en Eŭropo.

Gŭo Ŝouĝing (1231-1316 p. K.) estis elstara sciencisto de Jŭan-dinastio. Dum la regado de Kublajo, Gŭo Ŝouĝing respondencis pri revizio de kalendaro. Li faris pli ol dek astronomiajn aparatojn, per kiuj li faris astronomian observadon kaj ekzaktan kalkulon. Laŭ lia kalkulo, unu jaro havas 365.2425 tagoj, la ekarto de la kalkulo, kompare kun la tempo, kiun la terглоbo

bezonas efektive por rondiri ĉirkaŭ la suno, estas nur 26 sekundoj. Li projektis la kalendaron *Ŝouŝi*, kiu estis sama al la nuna Gregoria kalendaro en jarperiodo kaj naskita je 300 jaroj pli frue ol tiu lasta. Li gvidis astronomian mezuradon en la tuta lando siatempe. La plej norda mezurpunkto troviĝis en Tjelej de la baseno de la rivero Jenisejo en la nuna Siberio kaj la plej suda en Ŝjiŝa-insularo en la Suda Ĉina Maro.

Guo Ŝouĝing estis ankaŭ fakulo pri hidraŭliko. Li gvidis riparadon de multaj kanaletoj ambaŭborde de la Flava Rivero en Gansu kaj Ningŝja, kiuj irigaciis pli ol 600 000 hektarojn da kampoj. Li gvidis ankaŭ la fosadon de la kanalo inter Tongĝoŭ kaj Dadu (la unua Pekino), tiel ke eblis por la greno-transportaj ŝipoj el la sudo navigacii rekte al Dadu.

### POEMOJ KAJ OPEROJ DE SONG- KAJ JŬAN-DINASTIOJ

El la literaturaj verkoj de la periodo de Song- kaj Jŭan-dinastioj la plej famaj estis *Song-ci-o* kaj *Jŭan-ĉju-o*.

*Ci-o* formiĝis en Tang-dinastio. En la komenco ĝi estis populara



Ŝen Kŭo





# Kun kiuj landoj Ĉinio starigis diplomatajn rilatojn

de MEJ ĜI

La registaro de la Ĉina Popola Respubliko ĉiam observas diplomatajn politikojn de sendependeco kaj memstareco, kaj disvolvas diplomatajn rilatojn kaj interŝanĝojn ekonomiajn kaj kulturajn kun diversaj landoj de la mondo sur la bazo de la kvin principoj de reciproka respekto al suvereneco kaj teritoria integreco, reciproka neagreso, reciproka neinterveno en internajn aferojn, egaleco kaj reciproka favoro kaj paca kunekzisto. Ĝis la fino de majo, 1984, Ĉinio starigis diplomatajn rilatojn kun 129 landoj. Jen tabelo de tiuj landoj kaj la datoj de starigo de diplomataj rilatoj.

landoj	datoj
<b>Azio</b>	
Korea Demokratia Popola Respubliko	6, 10, 1949
Mongola Popola Respubliko	16, 10, 1949
Vjetnama Socialisma Respubliko	18, 1, 1950
Hinda Respubliko	1, 4, 1950
Socialisma Respubliko de Unuiĝo de Birmo	8, 6, 1950
Islama Respubliko de Pakistano	21, 5, 1951
Afgana Demokratia Respubliko	20, 1, 1955
Nepala Reĝlando	1, 8, 1955
Siria Araba Respubliko	1, 8, 1956

Jemena Araba Respubliko	24, 9, 1956
Demokratia Socialisma Respubliko de Srilankao	7, 2, 1957
Demokratia Kampuĉo	19, 7, 1958
Iraka Respubliko	25, 8, 1958
Laosa Popola Demokratia Respubliko	25, 4, 1961
Jemena Popola Demokratia Respubliko	31, 1, 1968
Kuvajto	22, 3, 1971
Turka Respubliko	4, 8, 1971
Irana Islama Respubliko	16, 8, 1971
Libana Respubliko	9, 11, 1971
Cipra Respubliko	14, 12, 1971
Japanio	29, 9, 1972
Maldiva Respubliko	14, 10, 1972
Malajzio	31, 5, 1974
Filipina Respubliko	9, 6, 1975
Taj-reĝlando	1, 7, 1975
Bangladeŝa Popola Respubliko	4, 10, 1975
Jordana Haŝemita Reĝlando	7, 4, 1977
Omana Sultanejo	25, 5, 1978

## Afriko

Araba Egipta Respubliko	30, 5, 1956
Maroka Reĝlando	1, 11, 1958

rita al Doŭ E", estas konservataj hodiaŭ. Li estis ne nur fama dramisto sed ankaŭ iafaje servis kiel aktoro.

"Maljustaĵo Farita al Doŭ E" estis la plej eminenta verko de Ĝuan Hanĉing. Ĝi priskribis junan virinon Doŭ E, kiu estis kalumniita de kanajlo kaj kondamnita de subaĉetita guberniestro al ekzekuto. En la ekzeku-

tejo Doŭ E esprimis firman kaj justan akuzon al la feŭdaj regantoj: "Tero, kial vi juĝas la aferon sendistinge? Ĉielo, ĉu vi meritas la nomon, prenante la kanajlon kiel justulon?" Antaŭ pli ol 100 jaroj la dramo estis tradukita en la francan lingvon kaj enkondukita en Eŭropon.

La majstroverko de Ŭang Ŝipu estis "La Okcidenta Ĉam-

bro". Ĝi priskribis amaferon inter juna intelektulo Ĝang Ŝeng kaj nobela fraŭlino Cuj Jingjing. La verko prikantis la batalon de la juna paro por edziĝa libereco kaj kontraŭ la feŭda etiko, malkaŝis kaj vipis ĝian hipokritecon. "La Okcidenta Ĉambro" estis eminenta verko kun granda influo al la posta literaturo de Ĉinio.

Alĝeria Demokratia Popola Respubliko	20, 12, 1958
Sudana Demokratia Respubliko	4, 2, 1959
Gvineo Popola Revolucia Respubliko	4, 10, 1959
Ganao Respubliko	5, 7, 1960 <sup>1</sup>
Malia Respubliko	25, 10, 1960
Somalia Demokratia Respubliko	14, 12, 1960
Zaira Respubliko	20, 2, 1961 <sup>2</sup>
Uganda Respubliko	18, 10, 1962
Kenja Respubliko	14, 12, 1963
Burundia Respubliko	21, 12, 1963 <sup>3</sup>
Tunizia Respubliko	10, 1, 1964 <sup>4</sup>
Popola Respubliko de Kongo	22, 2, 1964
Unuiĝinta Respubliko de Tanzanio	26, 4, 1964
Centra-Afrika Respubliko	29, 9, 1964 <sup>5</sup>
Zambia Respubliko	29, 10, 1964
Benina Popola Respubliko	12, 11, 1964 <sup>6</sup>
Maŭritania Islama Respubliko	19, 7, 1965
Respubliko de Ekvatora Gvineo	15, 10, 1970
Socialisma Etiopio	24, 11, 1970
Niĝeria Federacia Respubliko	10, 2, 1971
Kamerunia Respubliko	26, 3, 1971
Siera-Leona Respubliko	29, 7, 1971
Rvanda Respubliko	12, 11, 1971
Senegala Respubliko	7, 12, 1971
Maŭricio	15, 4, 1972
Toga Respubliko	19, 9, 1972
Madagaskara Demokratia Respubliko	6, 11, 1972
Ĉada Respubliko	28, 11, 1972
Respubliko de Supra Voltao	15, 9, 1973
Respubliko de Gvineo Bisao	15, 3, 1974
Gabona Respubliko	20, 4, 1974
Niĝera Respubliko	20, 7, 1974
Gambia Respubliko	14, 12, 1974
Bocvana Respubliko	6, 1, 1975
Mozambika Popola Respubliko	25, 6, 1975
Demokratia Respubliko de Santo-meo kaj Principo	12, 7, 1975
Komora Islama Federacia Respubliko	13, 11, 1975
Respubliko de Verda Kabo	25, 4, 1976
Sejĉela Respubliko	30, 6, 1976

Liberia Respubliko	17, 2, 1977
Araba Libia Popola Socialisma Ĝemahirio	9, 8, 1978
Ĝibutia Respubliko	8, 1, 1979
Zimbabvea Respubliko	18, 4, 1980
Angola Popola Respubliko	12, 1, 1983
Ebura Respubliko	2, 3, 1983
Lesota Reĝlando	30, 4, 1983

## Eŭropo

Unuiĝo de Socialismaj Sovetaj Respublikoj	3, 10, 1949
Bulgara Popola Respubliko	4, 10, 1949
Rumana Socialisma Respubliko	5, 10, 1949
Hungara Popola Respubliko	6, 10, 1949
Ĉeĥoslovaka Socialisma Respubliko	6, 10, 1949
Pola Popola Respubliko	7, 10, 1949
Germana Demokratia Respubliko	27, 10, 1949
Albana Socialisma Popola Respubliko	23, 11, 1949
Sveda Reĝlando	9, 5, 1950
Dana Reĝlando	11, 5, 1950
Svisa Federacio	14, 9, 1950
Finna Respubliko	28, 10, 1950
Norvega Reĝlando	5, 10, 1954
Jugoslava Socialisma Federacia Respubliko	2, 1, 1955
Franca Respubliko	27, 1, 1964
Itala Respubliko	6, 11, 1970
Sanmarina Respubliko	6, 5, 1971 <sup>7</sup>
Aŭstra Respubliko	28, 5, 1971
Belga Reĝlando	25, 10, 1971
Islanda Respubliko	8, 12, 1971
Malta Respubliko	31, 1, 1972
Unuiĝinta Reĝlando de Britio kaj Norda Irlando	13, 3, 1972 <sup>8</sup>
Nederlanda Reĝlando	18, 5, 1972 <sup>9</sup>
Greka Respubliko	5, 6, 1972
Germana Federacia Respubliko	11, 10, 1972
Grand-duka Luksemburgio	16, 11, 1972
Hispanio	9, 3, 1973
Portugala Respubliko	8, 2, 1979
Irlando	22, 6, 1979





## 第八课 Oka Leciono

# *Kiam vi atingis Pekinon?*

### I. Vortoj

han-lingvo	han-lingva fonetika alfabeto	Esperanto
旅行 (verbo, subst.) <sup>1</sup>	lǚxíng	vojaĝ-
年 (subst.)	nián	jaro
第一 (orda numeralo) <sup>2</sup>	diyī	unua
次 (mezurvorto)	cì	fojo

### Ameriko

Kuba Respubliko	28, 9, 1960
Kanado	13, 10, 1970
Ĉilia Respubliko	15, 12, 1970
Perua Respubliko	2, 11, 1971
Unuiĝintaj Ŝtatoj de Meksikio	14, 2, 1972
Argentina Respubliko	19, 2, 1972
Kooperativa Respubliko de Gvajakano	27, 6, 1972
Jamaiko	21, 11, 1972
Respubliko de Trinidado kaj Tobago	20, 6, 1974
Venezuela Respubliko	28, 6, 1974
Brazila Federacia Respubliko	15, 8, 1974
Surinama Respubliko	28, 5, 1976
Barbadoso	30, 5, 1977
Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko	1, 1, 1979
Ekvadora Respubliko	2, 1, 1980
Kolombia Respubliko	7, 2, 1980
Antiguo kaj Barbudo	1, 1, 1983

### Oceanio kaj Pacifikaj Insuloj

Aŭstralio	21, 12, 1972
Novzelando	22, 12, 1972
Fiĝioj	5, 11, 1975
Okcidenta Samoo	6, 11, 1975
Papua Novgvineo	12, 10, 1976
Kiribatia Respubliko	25, 6, 1980
Vanuatua Respubliko	26, 3, 1982

1. La 20-an de okt., 1966 la Ministerio de Eksteraj Aferoj de Ganao deklaris ĉesigi la diplomaciajn

rilatojn inter Ganao kaj Ĉinio. La 29-an de feb., 1972 restariĝis la diplomaciaj rilatoj.

2. La 18-an de sep., 1961 la ĉina registaro decidis malestabliti ambasadorejon kaj portempe ĉesigi la diplomaciajn rilatojn. La 24-an de nov., 1972 restariĝis la rilatoj. Samtempe Ĉinio kaj Zairo sendis diplomaciajn reprezentantojn de ambasadora klaso unu al la alia.

3. La 29-an de jan., 1965 la ĉefministro de Burundio deklaris portempe ĉesigi diplomaciajn rilatojn inter la du landoj. La 13-an de okt., 1971 restariĝis la rilatoj de ambasadora klaso.

4. La 26-an de sep., 1967 la Ministerio de Eksteraj Aferoj de Ĉinio decidis fermi sian ambasadorejon. La 8-an de okt., 1971 la ĉina registaro decidis denove sendi ambasadoron kaj komenci laboron de la ambasadorejo en Tunizio.

5. La 6-an de jan., 1966 ĝia registaro informis al Ĉinio rompi diplomaciajn rilatojn inter la du landoj. La 20-an de aŭg., 1976 restariĝis la rilatoj. Samtempe la du landoj reciprokis reprezentantojn de ambasadora klaso.

6. La 3-an de jan., 1966 la dahomea registaro deklaris ĉesigi la diplomaciajn rilatojn inter la du landoj. La 29-an de dec., 1972 restariĝis la rilatoj de ambasadora klaso inter la du landoj.

7. La 6-an de maj., 1971 establiĝis oficiala rilato de konsula klaso inter la du landoj.

8. La 17-an de jun., 1954 la du landoj reciprokis aferŝarĝitojn. La 18-an de maj., 1972 ambasadoroj anstataŭis la aferŝarĝitojn.

9. La 19-an de nov., 1954 ambaŭ landoj reciprokis aferŝarĝitojn. La 18-an de maj., 1972 ambaŭ landoj anstataŭigis aferŝarĝitejon per ambasadorejo. La 5-an de maj., 1981 la ĉina registaro anstataŭigis sian ambasadorejon per aferŝarĝitejo. La 1-an de feb., 1984 restariĝis ambasadorklasa rilato inter la du landoj.

来 (verbo)	lái	veni
中国 (subst.)	Zhōngguó	Ĉinio
不 (adverbo)	bù	ne
在 (prepozicio) <sup>3</sup>	zài	en, ĉe, je
一 (numeralo) <sup>4</sup>	yī	unu
过 (partikulo) <sup>5</sup>	guò	
时间 (subst.)	shíjiān	tempo
到达 (verbo)	dàodá	atingi
北京 (subst.)	Běijīng	Pekino
分 (mezurvorto)	fēn	minuto
上午 (subst.)	shàngwǔ	antaŭtagmezo
下午 (subst.) <sup>6</sup>	xiàwǔ	posttagmezo
机场 (subst.)	jīchǎng	aerodromo

## 2. teksto

han-lingvo

HFA

laŭvorta traduko

Esp-a traduko

han-lingvo

HFA

laŭvorta traduko

Esp-a traduko

han-lingvo

HFA

laŭvorta traduko

Esp-a traduko

han-lingvo

HFA

laŭvorta traduko

Esp-a traduko

han-lingvo

HFA

laŭvorta traduko

Esp-a traduko

Han-lingvo

HFA

laŭvorta traduko

Esp-a traduko

林红: “安娜, 你 喜欢 旅行 吗?”

Lín Hóng: “Annà, nǐ xǐhuān lǚxíng ma?”

vi ŝati vojaĝ- ĉu

Lin Hong: “Anna, ĉu vi ŝatas vojaĝon?”

安娜: “是。我 每年 都 旅行。”

Annà: “Shì. Wǒ měinián dōu lǚxíng.”

jes mi ĉiujare vojaĝi

Anna: “Jes. Ĉiujare mi vojaĝas.”

林红: “你 第一次 来 中国 吗?”

Lín Hóng: “Nǐ dìyī cì lái Zhōngguó ma?”

vi unuafoje veni Ĉinio ĉu

Lin Hong: “Ĉu vi unuafoje venis al Ĉinio?”

安娜: “不, 我 在 一九八三年 十二月 五日 来过 中国。”

Annà: “Bù, wǒ zài yījiǔbā sānnián shí'èryuè wǔrì lái guò Zhōngguó.”

ne mi je 1983 jaro decembro la kvina (tago) veni Ĉinio

Anna: “Ne, mi venis al Ĉinio je la kvina de decembro, 1983.”

林红: “你 什么 时间 到达 北京?”

Lín Hóng: “Nǐ shénme shíjiān dàodá Běijīng?”

vi kiun tempon atingi Pekino

Lin Hong: “Kiam vi atingis Pekinon?”

安娜: “我 在 上午 九时 四 十 六 分 到达 北京 机场。”

Annà: “Wǒ zài shàngwǔ jiǔ shí sìshí liù fēn dàodá Běijīng jīchǎng.”

mi je antaŭtagmezo naŭ (a) horo kvardek ses minuto atingi Pekino aerodromo

Anna: “Je la naŭa (horo) kaj kvardek ses minutoj antaŭtagmeze mi atingis pekinan aerodromon.”



## Klarigoj

1. “旅行”: ĝi povas funkcii kiel verbo kaj ankaŭ kiel nomo. En la frazo de tiu ĉi leciono “你喜欢旅行吗?” ĝi estas nomo, dum en la alia frazo “我每年都旅行” ĝi estas verbo.
2. “第一” En han-lingvo oni metas “第” antaŭ la numeraloj kaj tiel faras ordajn numeralojn. Ekzemple: 第一 (unua), 第二 (dua), 第八 (oka). Vidu la ideografiaĵojn de la titolo de ĉiu nia leciono.
3. “在” Ĝi povas funkcii kiel adverbo kaj ankaŭ kiel prepozicio. Funkciante kiel la lasta, ĝi povas konstrui prepoziciajn vortgrupojn kune kun nomo aŭ aliaj vortoj esprimantaj tempon, lokon kaj direkton. Tiaj vortgrupoj determinas verbon kaj ludas rolon de adjekto. La ofte uzata formo estas “... 在 + nomo + verbo ...”. Ekzemple “我在上午到达北京。”
4. Krom “一” (unu), troviĝas aliaj bazaj numeraloj en tiu ĉi leciono:

二 (du)	九 (naŭ)
三 (tri)	十 (dek)
四 (kvar)	Krom tiuj estas ankaŭ
五 (kvin)	百 (cent)
六 (ses)	千 (mil)
七 (sep)	万 (dekmil)
八 (ok)	ktp.

Post numeraloj ofte aldoniĝas mezurvortoj, ekzemple 一次 (unufoj-) kaj 三次 (trifoj-). Tiaj vortkombinoj ofte determinas substantivon kiel epiteto en frazo.

5. “过” estas verbo kaj ankaŭ partikulo, kiu estas unu el la rimedoj por montri is-tempon. Ofte videbla estas la strukturo “... verbo + 过 ...”. Al han-lingvo mankas konjugacio. Verban tempon oni montras ĉefe per kelkaj partikuloj, adverboj kaj “tempaj substantivoj”. Por indiki preteriton, krom “过” oni povas uzi tempan adverbbon, metante ĝin antaŭ la verbo. Oni povas uzi ankaŭ samtempe ambaŭ, kun la formo de “... tempa adverbo + verbo + 过 ...”. Ekzemple: “我去年去过北京”。
6. Notu: de nun ankaŭ novajn vortojn ekster la teksto (ekzemple en la klarigoj) ni metas en la liston de lernotaj vortoj komence de ĉiu leciono.
7. Esprimado de dato:

monato:

一月 (januaro)	五月 (majo)	九月 (septembro)
二月 (februaro)	六月 (junio)	十月 (oktobro)
三月 (marto)	七月 (julio)	十一月 (novembro)
四月 (aprilo)	八月 (aŭgusto)	十二月 (decembro)

tago:

一日 (la unua)      二日 (la dua)      三日 (la tria)      ...      三十日 (la trideka)

Por montri la horojn en la tago oni povas uzi “上午” (antaŭtagmeze) kaj “下午” (posttagmeze). Ekzemple: 上午九时 (antaŭtagmeze je la naŭa), 下午二时 (posttagmeze je la dua)

Por montri sesdek minutojn en unu horo oni uzas “分” (minuto): 三分 (tri minutoj), 十四分 (dekkvar minutoj), 五十九分 (kvindek naŭ minutoj) ktp.

Vortordo en han-lingvo por prezenti daton kaj horon estas: “年一月一日一时一分”, t.e., “jaro — monato — tago — horo — minuto”.

# Ĉe Jincŭan-ebenaĵo

de VEJ LJAŬ

**L**A antikva Granda Muro stumble serpentas okcidenten kiel multe travivinta vojaĝanto. Enirinte en la Ningŝja-an Hujnaciecan Aŭtonoman Regionon el Ŝenŝji-provinco, ĝi trapasas larĝan sablan zonan, preteriras la orientan randon de la smeralda Jincŭan-ebenaĵo kaj rekte kuras al la Flava Rivero torentanta orienten.

## DU MUROJ EN JANĈI

En Janĉi-gubernio estas du sekcioj de la Granda Muro. Unu komenciĝas de Julin en oriento, pasas tra la norda pordo de la gubernia urbo kaj sin direktas al la orienta bordo de la Flava Rivero. La alia situas 5-6 kilometrojn norde de la gubernia urbo, etendiĝas orienten kaj trovas sian finon, tuj enirinte en Ŝenŝji-provincon. Oni nomas la unuan "ekstera muro" kaj la duan "interna muro".

La interna muro konstruiĝis en 1474 en Ming-dinastio. Ĝi, kun longeco de 190 kilometroj, komenciĝas de Janĉi-gubernio kaj finiĝas ĉe la orienta bordo de la Flava Rivero en Ling'u-gubernio. Ĉe la ekstera flanko laŭlonge de la Granda Muro oni fosis pli ol 44 000 T-formajn defendajn kavojn. La interna muro estas serioze detruita kaj nun restas

nur ĝiaj altaj gvatturoj starantaj po kelkaj kilometroj sur la ruino de la muro.

En 1531, oni konstruis pli sude muron por plifortigi defendon, ĉar la interna muro, malproksima de la kazernoj ĉe Janĉi-gubernio, difektiĝis pro neriparado dum longa tempo.

Nun en Janĉi-gubernio bone konserviĝis parto de la Granda Muro longa je ĉirkaŭ ducent kilometroj. Ĝi estas la plej kompleta parto de la Granda Muro konservita en Ningŝja. La muro konstruita sur sablaj montetoj nomiĝis "purpura muro" pro tio, ke samkolora estis la tero, el kiu oni konstruis la muron. La ruina bazo de la muro altas 6-8 metrojn kaj larĝas 8 metrojn. Tie la gvatturoj, kvankam difektitaj, tamen ankoraŭ restas en la alteco de dek metroj sur la murbazo kaj distancas ĉ. 150 metrojn unu de la alia. Ĉe la ekstera flanko de la muro kuŝas tranĉeo profunda kaj larĝa je pli ol ses metroj. Jen fama defenda fortikaĵo. Siatempe la tranĉeo ne nur efike baris la vojon al la sudenatakantaj malamikoj, sed ankaŭ servis kiel oportuna trapasejo. Tiamaj komercistoj per la tranĉeo sekure transportis salon en la landinteron. Kvankam la tranĉeo spertis erozion de sablo-vento dum pli

ol kvarcent jaroj, tamen ĝia konturo restas distingebla hodiaŭ.

En la antikveco Janĉi-gubernio funkciis kiel la plej grava loko en Ningŝja por sin defendi kontraŭ malamikoj. En la dinastioj Ming (1368 p. K. — 1644 p. K.) kaj Ĉing (1644 p. K. — 1911 p. K.) la kortegoj ĉiu garnizonigis tie cent milojn da soldatoj. Nun konserviĝis la alta kaj dika urbomuro de Janĉi, kiu ankoraŭ elspiras siatempan batalan etoson.

La nomita gubernio nun havas 120 000 loĝantojn, kiuj sin okupas ĉefe pri brutobredado. Tre famas ĝia felo de unu-monata ŝafido. La bukraj haroj longaj je pli ol dek centimetroj estas tre delikataj, molaj kaj varmokonservaj.

Vespere, akompanate de Ĝang, sekretario de la gubernio, mi eliris el la norda pordo de la urbo kaj vidis, ke la antikva Granda Muro, silente daŭrigas sian iradon preter ni al la subiranta suno en la vasta dezerto.

## JINCŬAN-EBENAĴO

De Janĉi-gubernio mi per aŭto daŭrigis mian vojaĝon okcidenten laŭ la Granda Muro. Miaj palpebroj malleviĝis pro la monotonaj kaj senvigilaj dezertaj vidaĵoj, kaj mi dormetis pli ol du horojn. Kiam mi vekiĝis, subite




aperis antaŭ mi vasta verdaĵo, kaj en palpebruma daŭro la aŭto kun mi jam dronis en senlima verda “maro”.

Ho, mi atingis Jinĉŭan-ebenaĵon konatan kiel riĉa lando ĉe la Granda Muro.

La ebenaĵo estis formita de sedimento de ŝlimo kaj sablo de la Flava Rivero. Ĝi najbaras oriente kun Ordos-altebenaĵo kaj okcidente kun Helan-montaro kaj Tenger-dezerto. Ĝi longas ĉirkaŭ 320 kilometrojn de sudo al nordo kaj larĝas maksimume ĉirkaŭ 40 kilometrojn de oriento al okcidento. La Flava Rivero trairas ĝin de sudokcidente nord-orienten. Ambaŭborde de la rivero kuŝas 11 gubernioj kaj urboj, kun pli ol 210 000 hektaroj da agroj.

De la antikveco Jinĉŭan-ebenaĵo estas grenejo. Ekde Song-dinastio (960 p. K. — 1279 p. K.) ĝia popolo jam prenis rizon kiel sian ĉefan manĝaĵon. Nun ĝi estas grava gren-produktejo de la Ningŝja-a Huj-nacieca Aŭtonoma Regiono. Tie oni kulturas tritikon, rizon, milion, sojfabon, sorgon kaj maizon. La hektara produktokvanto de unurikolta rizo superis meznombre 7 500 kilogramojn.

Estis sezono de printempa plugado. Printempo venis pli frue ol mi kaj afable pretigis por mi verdan tapiŝon sur la vasta tero. La aŭto kuris sur ĝi, de malproksime vidiĝis homfiguroj navete irantaj sur mallarĝa kampvoĵeto, kaj en la proksimo altaj muloj kun fojno surdorse iris per malrapidaj pezaj paŝoj. Ĉirkaŭe interkruciĝis irigaciaj kanaloj kun milde fluanta akvo. . . Jen riĉa kaj bela Jinĉŭan-ebenaĵo, kiu plene montris sian ĉarmecon en la agrablaj printempaj tagoj.



*Verdaĵo sur Jinĉŭan-ebenaĵo*

### IMAMO DE ĈONGŜING-SUBDISTRIKTO

Enirinte Ling’u-gubernion, la Granda Muro sin etendas plue nordokcidenten kaj fine malaperas ĉe la orienta bordo de la Flava Rivero. Mi veturis per aŭto en la urbon de Ling’u-gubernio por koni la vivon de huj-oj (ĉinaj islamanoj) ĉe la piedo de la Granda Muro.

Frumatene de la sekvanta tago mi veturis per prunteprenita biciklo rekte al Ĉongŝing-subdistrikto 6-7 kilometrojn for de la urbo.

En la moskeo de la subdistrikto mi renkontiĝis kun iu imamo. Lia vizaĝo radiis de vigleco, kaj lia parol-turno estis diskreta. Lia griza barbo impresis digne kaj afable.

La imamo estis tre okupita. Li hastis al la gubernia urbo por rito. Li kun plezuro akceptis mian peton kunvojaĝi por babili.


Okaze ni vizitis familiojn de huj-oj. Post tio ni biciklis laŭ ebena kaj rekta asphaltita vojo.

Mi diris al li: “Mi unuafoje vidis tiel purajn kortojn en la kamparo. Kokoj kaj ŝafoj estas bredataj, tamen nenie vidiĝas ilia fekaĵo.”

“Pureco estas kutime observata de la huj-oj,” respondis la imamo kun fiero.

El la konversacio mi informiĝis, ke lia plej aĝa filo funkcias kiel direktoro de iu farmo, lia plej juna filo estas lignaĵisto kaj lia filino, diplomitiĝinte el universitato, instruas en mezlernejo. La tuta familio vivas feliĉe.

## SUDE KAJ NORDE DE LA GRANDA MURO



Nia konversacio de tempo al tempo estis interrompita de homoj, kiuj respektoplene salutis la imamon.

Li diris al mi: “Ĉi tie la huj-oj vivas tre riĉe, nun ne malofte videblas familioj kun jara enspezo de dekmil ĵuanoj. En la tuta subdistrikto pli ol kvardek familioj aĉetis aŭtojn.” Ĉe tio li montris per mano la senliman ebenaĵon kaj diris kun profunda sento: “Kiel ne riĉas la vivo de la huj-oj kun tiel fekunda tero?”

Ĉe vojkruciĝo proksima al la guberni-urbo, mi adiaŭis la imamon.

### UTILIGADO DE LA FLAVA RIVERO

Sian riĉecon la huj-oj ŝuldas al la fekundeco de Jinĉŭan-ebenaĵo, dum la ebenaĵo atribuas sian fekundecon al la utiligado de la Flava Rivero.

En la periodoj de Printempo kaj Aŭtuno kaj Militantaj Regnoj Jinĉŭan-ebenaĵo ankoraŭ estis nomada regiono de Ĉjang-nacieco. En la jaro 214 a. K. la Unua Imperiestro de Ĉin-dinastio konstruigis tie murojn kaj garnizonigis grandan armeon. Por solvi la problemon de gren-provizo, la garnizonantaj soldatoj ekspluatis kaj kulturis la teron kaj fosis

kanalon ĉe la orienta bordo de la Flava Rivero. Poste la dinastioj Han (206 a. K. — 220 p. K.), Tang (618 p. K. — 907 p. K.) kaj Ĉing (1644 p. K. — 1911 p. K.) ĉiu konstruis tie kanalon por elkonduki akvon. Tiuj kanaloj formis rudimentan irigacian sistemon de la regiono.

Antaŭ la Liberiĝo la produktokvanto de greno ĉiam pli malaltiĝis pro tio, ke la kanaloj ne estis riparitaj dum longa tempo kaj la kampoj suferis atakon de vento kaj sablo kaj erozion de riverakvo.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio oni konstruis laŭbordo de la Flava Rivero eternajn bordoprotektajn digojn, plilongigis kaj plivastigis la kanalojn konstruitajn de Ĉin- kaj Han-dinastioj, nove konstruis iujn trunkajn kaj branĉajn kanalojn, paŝo-post-paŝe kompletigis la irigacian kaj drenan sistemon de la regiono.

Precipe en la periodo de 1958 ĝis 1960 la registaro faris grandan akvoutiligan pivotan konstruaĵon de Ĉingtongŝja, per kiu definitive finiĝis la historio konduki akvon sen akvobaraĵo en la regiono. Nun sep trunkaj kanaloj kondukas akvon el ĝi. La totala areo de irigaciataj kampoj en tiu regiono atingis pli ol


30 000 kvadratajn kilometrojn, kie vivas 1 365 000 loĝantoj. La totala longeco de la irigaciaj kanaloj superis 490 kilometrojn kaj la areo de memirigaciataj kampoj atingis pli ol 200 000 hektarojn.

De Ling’u-gubernio mi veturis per aŭto al Ĉingtongŝja. Tie inter la du montoj en oriento kaj okcidento imponas grandioza akvobaraĵo, kiu faris la muĝantan Flavan Riveron krieta. En la ondetanta akvo speguliĝas 108 pagodoj sur la altaj kaj krutaj montoj ĉe la okcidenta bordo. La sep trunkaj kanaloj, kiel grandegaj laktotuboj, nutras la vastan Jinĉŭan-ebenaĵon.

Tio rememorigis min pri jenaj antikvaj versoj:

*Nur Jinĉŭan ĉe Granda la Muro*

*plej riĉas ĉe l’ Flava Rivero,  
famiĝas, renomas ja kiel  
la sudo de Jangzi-rivero.*



SUDE KAJ NORDE DE LA GRANDA MURO(8)

# LA RIĈA JINĈŬAN-EBENAĴO

Fotoj de LI CUNGENG

Ruino de la Granda Muro en Janĉi-gubernio



La antikva Granda Muro en Gujŭan-gubernio









La kanalo Ĉinĉju en mateno

Moskeo en Jinĉŭan





Riĉa rikolto de rizo sur Jinĉuan-ebenaĵo

Huj-aj virinoj

Ŝaf-peltoj de Ningŝja





# Tradiciaj metioj en Ĝanang-gubernio

Depost 1980 la registaro de Ĝanang-gubernio de Tibeto asignis grandan monsumon al disvolvo de la lokaj tradiciaj metioj. Nun 3 100 familioj, t.e. 53.4% de la totala nombro de kamparaj familioj en la gubernio, okupiĝas pri man-teksado.

La disvolviĝo de la tibetaj metioj multe riĉigis la vivon de la lokanoj.

Cering Lobu, kiu vivis el monhelpo en la pasinteco, rekomencis sian malnovan metion de man-teksado de matracoj. Li enspezas pli kaj pli multe kun ĉiu jaro kaj lia kvar-membra familio enloĝiĝis en nova domo.







La 76-jara Tubdain tordas lanfadenojn por sia bofilo, kiu faras lanteksaĵojn.

Knabino Daglha Ĉoizom lerta en farado de lanteksaĵoj



Maljuna kamarano kun 50-jara sperto fondis sian privatan farejon de argilaĵoj. Nun ĝi povas fari pli ol 40 specojn de argilaĵoj.

